



POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Marto 1911.

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro IV (vi) — Nro 3 (48)

Czyń każdy w swem kółku, co każe duch boży, a całość sama się złoży.

Filozofja języka międzynarodowego.

(Dokończenie)

Skomplikowane i coraz bardziej rozszerzające i komplikujące się stosunki międzykulturalne nowoczesnego typu muszą urzeczywistniać się w pewnej formie mownej. Historia poucza nas, że dotychczas tylko stosunkom życia wewnątrzspołecznego odpowiadała osobna forma mowna, w postaci języków narodowych. Lecz każdy język naturalny jest tak napiętnowany życiem swego narodu, tak najgłębiej i najistotniej z niem zespolony, że skoro zjawia się w ludzkości nowa, wymagająca formy mownej, sfera stosunków, o naturze zupełnie odmiennej, sfera stosunków międzykulturalnych stu kultur narodowych, *to forma mowna tych nowych stosunków ludzkich musi ułożyć się odpowiednio do zasadniczo odmiennej ich istoty.*

To jest podstawowy wywód, który umożliwia wyprowadzenie wniosków względem właściwości i roli ewentualnego języka międzynarodowego. Możemy najprzód ustalić matematyczne jakoby równanie, że jak istota życia społeczno-narodowego odzwierciadla się w języku narodowym, tak istota stosunków międzynarodowych odzwierciadla się w ewentualnej mowie międzynarodowej. I patrzmy. Skoro naród jest egzystencją indywidualną — widzimy, że

i język jest też egzystencją indywidualną, z życia narodowego wynikłą. Inaczej w zakresie stosunków międzynarodowych: są one jeno „funkcją“ samodzielnych dorobków narodowych, a odpowiadająca im forma mowna może być znów tylko „funkcją“ narodowych języków, języków, naturalnie germano-romańskich, jako reprezentantów tych społeczeństw, które wytworzyły całą tę formację stosunków międzynarodowych, całą tę dzisiejszą kulturę. Dalej, u kolebki życia społecznego widzimy instynktową, nieświadomą, ślepa i bezładną twórczość naturalną jednostek — i widzimy, że też same czynniki budują języki naturalne. Kiedy więc z drugiej strony, u podstawy dzisiejszego życia międzynarodowego spotykamy celową, świadomą, uorganizowaną pracę, mamy prawo wnioskować, że strona mowna tego szczególnego życia również rezultatem być musi pewnej świadomej, celowej i obmyślanej roboty.

Można ustalić inne jeszcze, matematyczne jakoby równanie i powiedzieć, że w jakim stosunku znajduje się życie narodowe do tak zwanego międzynarodowego, w takim też stosunku pozostawać muszą: naturalny język narodowy i — ewentualna międzynarodowa mowa. Z równania tego też wyciągnąć można

charakteryzujące język międzynarodowy wnioski. Przedewszystkiem więc, życie międzynarodowe dzisiejsze jest niczem innym, jak jedynie środkiem pomocniczym, którym posługuje się twórcze ognisko narodowej pracy, w narodowym języku upostaciowanej; i tak też mowa, którą życie międzynarodowe zgodnie z naturą swoją do egzystencji powoła, może być tylko środkiem pomocniczym porozumiewania się w stosunkach międzynarodowych, i nigdy nie zapłonie w nim wewnętrzny ogień *narodowego* ducha. I jeszcze jeden ważny można z naszego równania wyprowadzić wniosek. W zasadzie, i w samem, jakżeśmy widzieli, pochodzeniu dzisiejszych stosunków międzykulturalnych leży usamodzielnienie i wyzwolenie kulturalne poszczególnych narodów, wyzwolenie, z którego stosunki te poczęły się i do którego prowadzą. Skoro stosunki te skryształizują się w pewnej, odpowiednio do swej istoty, formie mownej, to ta ich forma mowna, ta szczególna, nowa mowa międzynarodowa będzie też usamodzielnieniem i wyzwoleniem narodowych języków. Ustanie bowiem potrzeba stawania się cudzoziemcem z języka, języki uniezależnią się, powrócą do swych naturalnych łożysk narodowych. Poczęty z równouprawnienia całego szeregu dzisiejszych wielkich języków narodowych, język międzynarodowy pomocniczy stać się musi najpotężniejszym czynnikiem dalszych równouprawnień.

Tak więc, drogą dedukcji, możnaby przed poznaniem, a nawet przed samem urzeczywistnieniem się go dosyć dokładnie poznać naturę ewentualnego języka międzynarodowego. Powstrzymując się od dalszych wniosków teoretycznych musimy powtórzyć, że 1) przy stosunkach obecnych, żaden język narodowy nie może odgrywać roli międzynarodowej mowy, ponieważ do roli tej jest organicznie niezdatny; 2) że musi on być planową, racjonalną syntezą na gruncie germano-romańskich języków, 3) że rola jego może być tylko pomocniczą i 4) że, kierując języki narodowe do ich naturalnego przeznaczenia w życiu narodowym, przyczyni się do bardziej normalnego ich rozwoju.

Konkretna historia pomocniczego sztucznego języka międzynarodowego daje nam liczne przykłady poszukiwania dróg, któreby doprowadziły do pomyslnego rozwiązania omawianej kwestji. A musiały to być szukania po omacku, próby, usiłowania; musiano, jak mówi Szyller, najprzód cały błąd wyczerpać, zanim doszliśmy do pięknego celu spokojnej prawdy. Kilkaset prób tego rodzaju wskazuje nam, jak wiele pracy włożyła ludzkość w rozwiązanie tego zadania, i jak trudno było wszystkim odnośnym postulatów teoretycznym zadość uczynić. Nawet pomysły pod wieloma względami genialnie upaść musiały, skoro pominęły choć jeden z nich; tak upadł sztuczny język Volapük, skoro twórca jego nie zrozumiał, że tylko na drodze racjonalnej syntezy języków romanogermańskich leży klucz zagadki. Jest rzeczą niesłychanie ciekawą, że genialny twórca Esperanta dwoma szlakami szedł do rozwiązania zagadki; umysł jego przeżywał praktycznie wszystkie te ślepe, nieudane próby, które przeżyła już ludzkość sama, a z drugiej strony umysł ten z niepojętą przenikliwością odkrywał zasady teoretyczne, na których na zawsze ugruntować się musiało tego rodzaju dzieło. I oto na zbiegu tych dwóch szlaków znajdujemy utwór przedziwny, urzeczywistnienie marzeń ludzkości od Descartes'a do Leibnitza i Maksa Müllera, skonkretyzowanie wszystkich postulatów teorii i całej doświadczałnej mądrości. Pisząc dla esperantystów, nie będziemy rozwodzić się nad genialną budową arcyciekawej koncepcji filologicznej języka Esperanto, zaznaczymy tylko, że jest on tem właśnie, co nazwalibyśmy celową świadomą syntezą w zakresie mowy. W 16 prawidłach streszcza gramatyka Esperanta osnowę wszelkiej możliwej gramatyki języka wogóle; i to jest budowy jego celowy, racjonalny fundament; romanogermańskie naogół jego słownictwo, wcielając wszystkie już gotowe pierwiastki międzynarodowe języków, mówi nam o roli, jaką rasa romano-germańska odegrała w wytworzeniu dzisiejszej cywilizacji; a znów cały

ten materiał słowny płynie w zdaniach logicznym i swobodnym potokiem mowy słowiańskiej; aglutynacyjny zaś charakter słowotworu, nadając językowi giętkość i ścisłość, jakich próżno szukać we fleksyjnych dialektach europejskich, jest też węzłem pokrewieństwa, łączącym język esperancki z wielkimi rodzinami aglutynacyjnych języków Azji.

Taką jest ta gruntująca się obecnie nowa forma mowna nowoczesnych stosunków międzykulturalnych.

„Zagadka języka międzynarodowego—pisze poeta nasz i tłumacz z sanskrytu „Mahabharatti“, Antoni Lange—jest rozstrzygniętą. Ostateczna, w granicach ludzkiego podobieństwa, najdoskonalsza forma rozwiązania tego problemu—stała się dziś skarbem publicznym. D-r. L. L. Zamenhof stworzył język, jaknajlepiej odpowiadający wszystkim wymaganiom mowy międzynarodowej. Wszystkie pomysły w tym przedmiocie, od Descartes'a począwszy a kończąc na Maksie Müllerze, złoży-

ły się na tę kwintessencję zagadnienia, która się zowie językiem Esperanto. Byłoby fałszywym rozumieniem rzeczy, gdyby język ten uważano za wytwór mózgu jednostkowego. Jednostka jest akumulatorem energii i dążeń gromady; jest ona punktem przecięcia—wierzeń i chcień człowieka wogóle, a nieraz całe wieki pracy przecinają się w jednostce. D-r. Esperanto ześrodkował w swoim mózgu pragnienie odwieczne i rozwiązał tajemnicę, nad którą pracowano od czterech niemal stuleci!“

Język Esperanto stworzony został w Warszawie. Na naszej ziemi rozwiązał się problemat, który, jak widzieliśmy, wytworzył się był w ludzkości całej; należy teraz do nas w urzeczywistnieniu tej wielkiej idei najdzielniejszy przyjąć udział; w miarę sił naszych godnie wypełnić wyznaczoną nam przez losy rolę w doniosłym procesie dziejowym, a świadomość spełnionego zadania będzie naszą nagrodą.

St. A. Dobrzański.

El Multatuli.

Jurisprudentia.

Juĝeja servanto: Sinjor' juĝisto, la homo, kiu mortigis Berbĥen, estas alkondukita.

Juĝisto: Tiu ĉi homo estos pendigita. Kiamaniere li faris tiun ĉi mortigon?

Juĝeja servanto: Li distranĉis ŝin je malgrandaj pecoj kaj pekulis.

Juĝisto: La ago estas krimega. La mortiginto estas pendigota.

Lotario: Sinjoro juĝisto, mi ne mortigis Berbĥen! Mi ŝin nutris, vestis kaj zorgis pri ŝi. Tie ĉi estas atestantoj, kiuj montros, ke mi estas bona homo kaj ne mortiginto.

Juĝisto: Mortiginto, vi estos pendigita! Vi nur pli punindigas vian agon per memfido. Homo, kulpigata en tia krimo, ne kuraĝu sin opinii bona.

Lotario: Sed, s. juĝisto, tie ĉi sin

trovas homoj, kiuj povas argumenti mian respondon. Kaj ĉar oni min nur kulpigas en krimo...

Juĝisto: Oni vin pendigos! Vi distranĉis je pecoj Berbĥen, pekulis ŝin kaj estas kontenta je sia ago... Tri grandaj krimoj estas evidentaj! — Kiu vi estas, virino?

Virino: Mi estas Berbĥen.

Lotario: Dank' al Dio! Sinjoro juĝisto, vi nun vidas, ke mi ŝin ne mortigis!

Juĝisto: Hm... jes... ni supozu! Sed vi ŝin pekulis!

Berbĥen: Ne, sinjor' juĝisto, li eĉ ne intencis min pekli. Kontraŭe, li al mi faris multe da bono. Li estas nobla homo.

Lotario: Ĉu vi aŭdas, sinjoro juĝisto? Ŝi diras, ke mi estas bona homo.

Juĝisto: Hm..., sed *la tria* punkto

restas en plena forto. Servanto, forkonduku lin, li estu pendigota. Li estas kulpa en memfido...

Super la bezono.

En unu el la Amsterdamaj hospitaloj oni devis amputi al maristo unu piedon.

La ĥirurgisto plenumis la operacion, dum kiu la maristo heroe fumis sian pipon. Ifoje li kunpremendis la dentojn, sed li sukcesis venki la doloron.

La operaciisto miris lian kuraĝon kaj, bandaĝante la vundon, ne ŝparis laŭdojn...

Subite la heroo korŝirante ekkriis.

La kaŭzo de tio ĉi estis, ke la ĥirurgo lin piketis.

— Kiel vi krias pro malgranda piketo, vi, kiu ĵus...

— Ĝi estas vero, sinjor' doktoro, sed vidu., tiu ĉi piko estis super la bezono!

La maristo havis la rajton plendi.

La kvara legendo pri la potenco.

— Diru, patro, kial la suno ne falas malsupren?

La patro konfuziĝis, ĉar li mem ne sciis, kial la suno ne falas kaj punis la filon tial, ke li lin konfuzis.

La infano ektimis la koleron de la patro kaj neniam plu demandis la patron nek kial la suno ne falas, nek pri multaj aliaj objektoj, kiujn li tamen soifis scii.

Tiu ĉi infano neniam fariĝis viro, malgraŭ tio, ke ĝi vivas en la mondo 6000 jarojn, — ne, eĉ pli multe.

La infano restis malsaĝa kaj malsprita ĝis nun. Trad. *B. Mirski*.

LEW TOLSTOJ.

La Alegorio.

W jednym z arabskich poematów jest opowiedziana następująca legenda:

Mojżesz, idąc przez pustynię zbliżył się do stada i usłyszał, jak modlił się pasterz: „O, Boże, jakże mam iść do Ciebie i jak się stać niewolnikiem Twoim? Z jaką radością obuwałbym i mył nogi Twoje, całowałbym je, prałbym szaty Twoje, porządkował mieszkanie i przyniósłbym Ci mleka od krów moich. Tęskni do Ciebie serce moje!”

Usłyszawszy te słowa, Mojżesz rozgniewał się na pasterza i rzekł: „Ty drwisz z Boga—Bóg jest duchem i ani szat, ani mieszkania, ani sług nie potrzebuje. Złość mówi przez Ciebie”.

Zasmuciło się serce pasterza. Nie mógł sobie wyobrazić istoty bez cielesnej powłoki, nie mógł się dalej modlić i służyć Bogu i rozpaczać począł.

Wtedy Bóg rzekł do Mojżesza: „Dlaczegoś odwiódt odemnie wiernego sługę mego? Każdy człowiek ma swoje ciało i swój sąd. Co dla jednego jest trucizną—dla drugiego jest słodkim miodem. Co dla jednego jest złe—dla drugiego jest dobre. Słowa nic nie znaczą. Ja widzę serce tego, kto się do Mnie zwraca“.

M.

En araba poemo estas rakontita jena legendo:

Mozeso, proksimiĝinte al brutaro aŭdis, kiel la paŝtisto preĝis al Dio. Jen kiel preĝis la paŝtisto:

„Ho, Dio, kiamaniere mi povus iri al Vi kaj fariĝi Via sklavo? Kun kia ĝojo mi vestus kaj lavus Viajn piedojn, kius ilin, lavus Viajn vestaĵojn, ordigus Vian loĝejon kaj alportus al Vi la lakton de miaj bovinoj... Sopiras al Vi mia koro!”

Aŭdinte tiajn vortojn, Mozeso ek-

koleris kontraŭ la paŝtisto kaj diris: „Vi mokas Dion; Dio estas spirito: nek vestojn, nek loĝejoj, nek servistojn Li bezonas. Malbono parolas per vi.”

Ekmalĝojis la koro de la paŝtisto. Li ne povis imagi estaĵon sen korpa kovraĵo, li ne povis plu preĝi kaj servi al Dio, li ekmalesperis.

Tiam Dio diris al Mozeso:

„Kial vi forŝiris de Mi fidelan mian serviston? Ĉiu homo havas sian korpon kaj sian juĝon. Kio por unu estas veneno, por alia estas dolĉa mielo. Kio por unu estas malbona, por alia estas bona. La vortoj signifas nenion. Mi vidas la koron de tiu, kiu sin turnas al Mi.”

(El „Danubo“)

Trad. *Kabe*

JULJUSZ SŁOWACKI.

En Svisujo. — W Szwajcaryi.

I.

Odkąd zniknęła jak sen jaki złoty
Usycham z żalu, omdlewam z tęsknoty
I nie wiem, czemu ta dusza z popiołów
Nie wylatuje za nią do Aniołów?
Czemu nie leci za niebieskie szranki
Do tej zbawionej i do tej kochanki.

XI.

Odtąd w uśmiechach była dla mnie rzadsza,
Smutniejsza, cichsza i bielsza i bladsza.
W głębszych się coraz zanurzała cieniach
I obrywała róże na strumieniach;
Albo przy kaskad naciągniętej lutni
Stawała słuchać, tak jak ludzie smutni,
Z twarzą spuszczoną; lub sama w ustroni
Ręce na białą zakładała szyję,
Jak ta, co boi się, albo się broni.
Lub jako gołąb, co w strumieniu pije,
Do nieba jasnym wzlatywała okiem.
Już wolnym, sennym błąkała się krokiem,
I jaskółczek utraciła zwinność,
I zadumała ją całą—niewinność.

XVI.

Jest chwila, gdy się ma księżyc pokazać,
Kiedy się wszystkie słowiki uciszą,
I wszystkie liście bez szelestu wiszą,
I ciszej źródła po murawach dyszą:
Jakby ta gwiazda miała coś nakazać,
I o czemś cichem pomówić ze światem,
Z każdym słowikiem, z listeczkim i z kwiatem.
Jest chwila, kiedy ze srebrzystą tęczą
Wychodzi bładny pierścionek Dyany;
Wszystkie się wtenczas słowiki rozjęczą,
I wszystkie liście na drzewach zabręcą,
I wszystkie źródła jęk wydają szklany;
O takiej chwili, ach! dwa serca płaczą,
Jeśli coś mają przebaczyć—przebaczą;
Jeżeli o czem zapomnieć—zapomną.
O takiej chwili z moją panią skromną
Jużeśmy siedli w naszych progach sielskich,
Już rozmawiali o rzeczach anielskich.

I.

Post ŝia forflugo, post sonĝo la ora,
Mi svenas sopire, sekiĝas dolora.
Ne scias mi, kial l' anim' al ĉieloj
Ne flugas el cindroj post ŝi, al anĝeloj?
Pro kio ne flugas al mondo alia,
Al tiu savita, amata la mia!

XI.

De nun en ridetoj por mi malplifoj,
Pli blanka, pli pala, mallaŭta, malĝoja,
En ĉiam profundaj pli ombroj ŝi iris,
Kaj rozojn sur bordoj torentaj deŝiris.
Aŭ apud kaskada liut' surtirita,
Vizaĝ'-malle vite, malgaja, medita
Aŭskultis; — aŭ sola en loko deflanka,
La manojn metadis sur kolo la blanka,
Kiele pro tim' aŭ defend' en danĝero;
Aŭ kiel trinkanta kolomb' el rivero,
Al ĉielo flugadis okulo per klara.
Ŝi iris dormema, per paŝo erara,
Kaj dronis, lertecon perdinte hirundan,
Pri la senkulpeco — mediton profundan.

XVI.

Moment' estas, antaŭ ol luno eliras:
La najtingalar' eksilentas la kanta,
Kaj pendas folioj sen mov' bruetanta,
Kaj fontoj herbejaj mallaŭte pli spiras;
Kiel ion anonci tuj devus la stelo,
Pri io kvieta paroli el ĉielo,
Kun floroj, folioj kaj ar' najtingala.
Moment' estas kiam, kun arko arĝenta,
La ringo Diana eliras la pala:
Ekĝemas la najtingalaro silenta,
Sur arbaj folioj ekzumas en ĥoroj,
Kaj vitran ekĝemon la fontoj eldonas,
En tia momento ah! ploras du koroj!
Se ion pardoni nur havas, — pardonas,
Se ion forgesi — forgesas memoroj;
Kun mia modesta estrin' en ĉi-horoj
Jam kune en sojloj idiljaj ni sidis,
Jam al ni anĝelajn aferojn konfidis.

Trad. Antoni Grabowski.

Kaatje.

Prezentota dum la Sepa Kongreso

kvarakta teatraĵo de *Paul Spaak*, esp. de D-ro *W. van der Biest*. Antaŭparolo de *Emile Verhaeren*. Kolekto de „La Revuo“. Paris. Librairie Hachette et C-ie. 1911.

Kaatje, drama verko de juna, sed jam fama poeto belga, estis prezentita kun granda sukceso, pli ol kvindekfoje, en la Brusela „Théâtre du Parc“ kaj estas tre ofte ludata en la Reĝa Nederlanda Teatro de Antverpeno. — Ĝi pentras la konflikton en la animo de juna, entuziasma, impresebla flandra pentristo Jan, sur kiun agas sinsekve du diferencaj klimatoj, ĉieloj, kulturoj — la itala kaj flandra. El Italujo, kie li studis la pentrarton sub gvidado de grandaj majstroj, li revenas kune kun sia fajreca, pasia, itala muzo Pomona, en la flandran hejmon, kie lin atendis la kvietaj, milda, laborema, dolĉa Kaatje. La itala muzo ne povas ekami la trankvilan ĉirkaŭaĵon, la malvarman klimaton, la plumbokoloran ĉielon. Ŝi enuas, ribelas kaj fine forkuras.

Jan restas rompita anime. Sian nefinitan pentraĵon, la bakhanalan „Festonon de dioj“ li detruas, ĉar li opinias, ke li tute perdis sian talenton.

El tiu apatio savas lin la hejma muzo Kaatje, malfermante liajn okulojn al la beleco de la hejma naturo:

„Al la kampoj, per greno diversa pentritaj,
De sekalo arĝentaj, de tritik'oritaj“
k. t. p.

Se la faktoj ne okazus en la komenco de la deksepa jarcento en Ho-

lando, ni povus supozi, ke la aminda, dolĉa Kaatje dum la foresto de Jan, legis atente nian „Pan Tadeusz“.

Nature estas, ke ŝi venkas kaj Jan fariĝas duoble feliĉa.

Ni vidas, ke la esenca enhavo de „Kaatje“ estas tre simpla, eĉ naiva, kaj tamen la teatraĵo ravas per sia ĉarmo kaj kortuŝas nin pruvante po la mila fojo, ke ĉiu temo en manoj de granda artisto povas fariĝi bona, ke en ĉiu bela verko la maniero de efektivigo ludas la plej gravan rolon.

Laŭ nia opinio la organiza Komitato de la Sepa Universala Kongreso de Esperanto (Aŭgusto 1911) en Antverpeno, faris tre bonan elekton, destinante tiu-ĉi teatraĵon por la prezentado.

Ĝi estos ludata de la reĝaj geaktoroj, kiuj havas en sia repertuaro la flandran tradukon, kaj tio certigas nin pri granda sukceso de „Kaatje“ en esperanta vestaĵo.

Kaj tiu-ĉi vestaĵo estas vere bela. La tradukinto ne povas esti tro laŭdata por sia majstra traduko. Lia lingvo estas tiel korekta kaj fluas tiel belsone per la kaskado de kvinpiedaj jamboj, ke ĝi pruvus en s-ro van der Biest ne nur profundan konon de nia lingvo, sed ankaŭ veran poezian talenton.

A. G.

Por Via veno...

Leopold Staff.

Per la folioj, per flor' tilia
Mi kovris sojlon por veno Via.

Sur mia tablo pomoj kaj vino
Atendas Vian venon, knabino.

Mi kovris liton per tolo blanka
Por Via veno, saluto danka.

Kisoj de l' buŝo kaj ĉirkaŭprenoj
Treme atendas por Via veno...

Mi Vin atendas, sopiras ĉiam
La tagon, kiu venos... neniam...

Esp. Z. K.

Ave Patria...

La 15-an de Aprilo 1910, dum la manovro, farata en la golfeto de Ŝimminato, proksima de Horoŝima, la submara ŝipeto „№ VI“ hazarde alfundiĝis, kaj neniam resupreniĝis. Oni fervore serĉadis ĝin, sed ĝi estis trovata nur post du tagoj; oni ĝin suprenlevis kaj malfermis la eniran truegon; ĉiuj ŝipetanoj estis jam mortintaj. Sed oni miregis, ke nenio estis senorda, kaj ĉiu ano estis mortinta sur la loko de sia posteno. Apud la kadavro de leŭtenanto Sakuma, la ŝipetestro, kiu troviĝis en la komandoturo, estis trovataj liaj postlasitaj notoj, skribitaj en kajero. Per ĝi oni ne nur bone sciigis pri la kaŭzo de alfundiĝo, sed oni ankaŭ eksciis, kun kia spiritoĉeesto la ŝipetanoj prizorgis siajn devojn ĝis la lasta momento. Jen estas la traduko:

„Per mia malatento mi pereigis la ŝipeton de Lia Imperiestra Moŝto kaj la vivojn de miaj subuloj; pri tio mi tute ne povas min senkulpigi. Sed mi ĝojas, ke ĉiuj ŝipetanoj prizorgis fidele ĝis la morto siajn devojn kun spiritoĉeesto. Nenion ni bedaŭras, ĉar ni mortas por la patrujo; sed mi timas, ke la okazintaĵo kaŭzos malkomprenon, kio eble malhelpos la disvolviĝon de submaraj ŝipoj. Miaj kunlaborantoj! ne malkomprenu, kaj ĉion esploru plej fervore, por ke vi povu en estonto multe plibonigi la submaran ŝipetaron!

Dum submara irado per gasolinmaŝino, nia ŝipeto okaze iris tro profunden; oni rapidis kunpremi la valvon, sed la ĉeno rompiĝis; oni faris tion mane, sed estis tro malfrue, kaj la malantaŭa ĉambro jam pleniĝis je akvo. — Suben iris la ŝipeto kun sinklino de ĉirkaŭ 25°.

Sinklino: ĉirkaŭ 13°.

Pro la subakviĝo de l' komutilaro la elektrolampoj estingiĝis; elektroŝnuroj bruliĝis; elfluo de venena gaso kaŭzas malfacilan, spiradon.

Ĉirkaŭ la 10a horo matene de la 15a tago, la ŝipeto alfundiĝis. Spite la venena gaso oni penas elpumpi la akvon per la manpumpilo.

Samtempe kun la alfundiro oni senakvigis la ĉefrezervujon; pro mallumo la mezurilo ne estas videbla, sed mi estas certa, ke la ĉefrezervujo estas jam malplena. Elektra baterio ne estas uzebila; fluido de elektra pilo elversiĝis, sed ne multe; mara akvo ne

trafluas; klorgaso ne estas produktata.— Sola espero estas la manpumpilo.

(Je la 11a horo kaj 45 minutoj; mi skribis la ĉi supran ĉe la lumeto de l' komandoturo.)

Per la enfluanta akvo la vestaĵoj malsekiĝis kaj ni sentas malvarmon.

Mi opinias, ke submarŝipetanoj bezonas nekonsterneblan kaj neskrupulan animon; ili devas agadi sentime; ĉar alie, plibonigo estus tute neebila; mi ĉiam avertis la subulojn, ke ili ne fariĝu timemaj pro troa skrupuleco. Oni povas priridi mian malprosperon, sed mi certigas, ke mi estas prava.

La profundometro de l' komandoturo montras „52“. Ni laboregas por senakvigo, sed ĝis la 12a horo la ŝipeto restas sur la fundo.

En tiu ĉi loko la akvo havas proksimume 10 klaftojn da profundo; tial la montrado de l' profundometro estas ĝusta.

Oficiroj kaj soldatoj de submara ŝipeto devas esti elektitaj el la elektitoj, por ke ni ne konfuziĝu en tia okazo.

Mi estis preta morti, kiam ajn mi foriris el mia hejmo, tial mi metis testamenton en la tirkeston de „Karasaki“. (Sed tio ĉi nur rilatas al mia privata afero; estas senbezone diri pli multe. Amikoj Taguĉi kaj Asami! rakontu tion ĉi al mia patro.)

Kun respektigo mi petas la Imperiestran Moŝton, ke li bonvolu ne lasi la postvivantajn familiojn de miaj subuloj suferi mankon de pano; tio sola estas la kaŭzo por maltrankviliĝo de mia koro.

Salutojn al jenaj sinjoroj:

Ministro Saito, Vicadmiralo Ŝimamura, Vicadmiralo Fujii, Subadmiralo Nava, Subadmiralo Jamaŝita, Subadmiralo Narita. (Nuntempe aera premo plialtiĝas, kaj estas kvazaŭ la oreltamburoj rompiĝos.)

Kapitano Oguri, Kapitano Ide, Subkapitano Macumura (Ĵun-iĉi), Kapitano Macumura (Riu), Komandanto Macumura (Kiku, mia frato), Kapitano Funakoŝi, Profesoro Narita Kotaro, Profesoro Ikuta Kokuji. La 12a horo kaj 30 minutoj. — Mi spiradas treege malfacile.

Mi pensas, ke gasolino estas jam forblovita; sed tamen mi ebriiĝas pro gasolingaso.

Kapitano Nakano.

La 12a horo kaj 40 minutoj.“

Tradukis *K. Nohara* — Japanujo. (El „Germana Esperantisto“.)

Opinie o Esperancie.

(Ciąg dalszy)

Tristan Bernard o Esperancie.

Nawróciłem się zeszłego października, a to dzięki niezrównanemu apostołowi Esperanta Ernestowi Archdeacon.

Po powrocie z letnich wczasów, znalazłem na biurku stos broszur. Zacząłem je oswabadzać z opasek, by sobie wytworzyć złudzenie, że je odczytałem. Ale, gdym doszedł do broszury p. Archdeacon, uderzyła mnie swoim tytułem.

Wziąłem ją do ręki.

W godzinę potem, już umiałem po esperancku, nie na tyle, co prawda, aby móc w nim rozmawiać, lecz dostatecznie, aby go rozumieć. Zapoznałem się z mechanizmem tego języka, cudownego w swej prostocie.

A nie jestem dzieckiem cudownym. Przeciwnie, trudno mi uczyć się języków, a natomiast—łatwo je zapominać.

Po dziesięć razy zabierałem się do angielskiego i nie udało mi się go zdobyć.

Moje wycieczki do Londynu pozostawiły mi straszne wspomnienia; zdawało mi się, że jestem rozbitkiem, zawadzającym wciąż o podwodne skały.

Bo—dodać muszę, zdawało mi się nie tylko, że mówię po angielsku, lecz że mówię najlepszym, rodowitym akcentem. Chciałem koniecznie uchodzić za Anglika. Rezultat był taki, że po pewnym czasie, nie otwierałem ust zgoła. W magazynach wskazywałem na migi przedmioty, o które mi chodziło. Wyjmowałem z kieszeni parę suwerek, za najmniejszy sprawunek płaciłem złotem, i chowałem resztę. Co wieczór wracałem do hotelu z kieszeniami pełnymi drobnych.

Raz tylko jeden zdołałem się porozumieć. A to dzięki Andrzejowi Picard. Autor „Jeunesse“ i „la Fugitive“ nie umiał ani słowa po angielsku. Lecz nie wstydził się mówić po francusku, tak iż po siedmiokrotnym powtórzeniu pytania, zyskał informacje, o które nam chodziło. Ja przez ten czas milczałem.

Zdaje mi się, że to Renan powie-

dział przyjacielowi, jadącemu do Londynu na konferencję z uczonymi:

— Jeżeli pan nie mówisz po angielsku wybornie, udawaj, że nie mówisz wcale. Tamci będą się starali porozumieć z panem po francusku najgorszą francuszczyzną, i w ten sposób weźmiesz nad nimi górę.

Lecz gdyby Anglicy zechcieli w ten sam sposób brać górę, nie ułatwiłoby to międzynarodowych stosunków.

Dlatego właśnie nauczyłem się Esperanta.

Esperantystom nie chodzi o wyrugowanie innych języków. Esperanto ma się stać tylko drugim językiem wszystkich narodów, ułatwiającym stosunki handlowe, naukowe i literackie.

I literackie — kładę nacisk na ten punkt, ważny dla moich kolegów dramaturgów.

Bywamy nieraz tłumaczeni fatalnie na obce języki. Zdarza się, że tłumacz zna doskonale język własny, a bardzo pobieżnie—francuski.

Będziemy zatem mogli tłumaczyć nasze sztuki na Esperanto, potem prześlemy je esperantystom angielskim, włoskim, niemieckim, którzy je przełożą na swoje macierzyste języki. Esperanto jest dość giętki, aby móc przebyć zwycięsko tę próbę podwójną.

Zresztą już zrobiono takie doświadczenie: ktoś przetłumaczył niewydany utwór francuski na Esperanto. Ów przekład został „zrekonstruowany“ na język pierwotny i w rezultacie różnice tekstu były nieznaczne.

Esperanto wyświadcza inne jeszcze—bardzo ważne usługi ludziom bezradnym wszędzie z powodu swego kactwa, a mianowicie ociemniałym.

Gdy który z nich udaje się do obcego kraju i miasta, znajduje w każdym hotelu adresy i nazwiska ociemniałych esperantystów, z którymi porozumiewa się łatwo, chodzi tylko o wprowadzenie wykładu Esperanta w Instytutach dla ociemniałych.

(„*Excelsior*“).

Znany francuski pisarz **Léon Fra-
pié** z powodu przesłanej mu książki
esperanckiej Archdeacon'a, pisze:

„Z mego punktu widzenia, jako filozofa
i autora, muszę przyznać, że najwięcej za-
dziwiła mnie literacka, a co zatem, i społe-
czna wartość tego języka. To jest, według
mojej opinii, najpewniejszą gwarancją jego
przyszłego powodzenia; język tylko handlowy
nigdy nie mógłby żyć i rozpowszechnić się.
Język, prawdziwie godny tego miana, winien
być zawsze gotowym instrumentem, czułym
na wibracje naszych radości i bólów. Tylko
to jest właściwą cechą bogactwa języka.
Nie mówiąc już o oryginalnych dziełach, bo
krytyczny rozbiór ich zadalekoby mnie za-
prowadził, zaznaczę tylko, że uderzyła mnie
zupełnie nieoczekiwanie zadziwiająca lite-
racka wartość przekładów. Dr. Ludwik
Zamenhof przelożył na Esperanto kilka kla-
sycznych arcydzieł: Hamleta, Zbójców i Ifi-
genię; z prawdziwą przyjemnością stwier-
dzam, że przekłady esperanckie są lepsze
niż przekłady tych dzieł na inne języki.
Esperanto posiada zdolność życiową i będzie
żył, nie tylko dlatego, że ułatwia handlowe
i turystyczne stosunki, ale i dlatego, że oka-
zał się środkiem zdolnym do ułatwiania
wzajemnego zrozumienia się narodów w sfe-
rze inteligencji i myśli...“

* * *

P. Lejeune, minister w Belgji: *Je-
stem teraz przekonany, że język mię-
dzynarodowy istnieje i życzę mu z ca-
łego serca szybkiego rozwoju. Przez
całe swoje życie starałem się poma-
gać biednym, nieszczęśliwym kolegom,
głuchoniemym, niewidomym, a w Espe-
rancie widzę dla nich ułatwienie w sto-
sunkach ze społeczeństwem. Winszu-
ję zatem z całego serca gorliwym
apostołom, którzy rozpowszechniają
ten język.*

P. Wu Chung, delegowany przez
rząd chiński na VI Kongres Esperan-
tystów w Waszyngtonie:

*Jestem szczęśliwy że zostałem de-
legowanym przez rząd chiński dla po-
witania członków tego kongresu. Są-
dzę, że Esperanto ma wielką przy-
szłość, gdyż coraz więcej przyjmuje
się u wszystkich narodowości.*

*Przedstawię swemu rządowi po-
stępy, jakie język Esperanto robi i mam
nadzieję, że zostanie wydane rozporzą-
dzenie nauczania tego języka w szko-
łach chińskich.*

Letero de S-ro kapitano Meier.

München, 12-an de julio 1910.

Altestimata sinjoro!

Per tio ĉi mi permesas al mi sciigi vin,
ke mi nun definitive forlasis „Ido'n“ kaj ree
aniĝis al „Esperanto“, ĉar miaj dujaraj spertoj
firme konvinkis min, ke Ido, pro siaj senĉesaj
reformoj, aliĝoj kaj plibonigoj, proponitaj de
ĉiuspecaj personoj, neniam fariĝos finita, certa
kaj praktika lingvo, due, laŭ la intencoj de la
estroj de la propagando de Ido, tiu ĉi idiomu
fariĝos lingvo taŭga nur por instruitaj homoj,
sed ne ankaŭ por simplaj personoj, kiuj absol-
vis nur elementan lernejon; laŭ mia opinio
„mondlingvo“ devas taŭgi por ĉiuj homoj, verk-
istoj kaj laboristoj, ktp., sed ne nur por in-
struituloj. Trie, nur tia lingvo internacia fine
venkos, kiu altiris la plej grandan anaron, kaj
Ido neniam povos superi tiurilate Esperanton!

L. E. Meier.

Hauptman a. D.

Rumfordstr. 25, München V.

Tiu ĉi letero, legata al la ĉeestantoj dum
la kongreso de U. E. A. en Augsburg, vekis
grandan aplaudon, ĉar nia afero regajnis tre
valoran pioniron, kies literaturaj verkoj estis
ŝatataj. Jen unu plua ekzemplo, ke la ĉiamaj
reformoj ne povas kontentigi veran anon de
la ideo de internacia helpa lingvo.

Se arbaro malhelpas iri antaŭen — oni ĝin trahakas, marojn — oni tra-
naĝas, montojn — oni traboras kaj, — senĉese la homoj iras kuraĝe antaŭen.

Scienco kaj vivo.

FAJREEROJ DE SCIENCO.

Tero kiel fonto de energio. Sciencistoj ne unufoje esploris la demandon: kio okazos en estonteco, kiam industrio kaj fabrikejoj foruzos tutan provizion de karbo? Utiligo de naturaj fortoj, kiel alfluo kaj defluo de maro, energio de akvo, lumo — ne ĉiam kaj ne ĉie estas uzebla. Franca sciencisto Barthelon montras eliron el ĉi-tiu eventuala situacio: oni povas uzi energion de l' tero, kiu estas neelĉerpebla. En profundo de 3—4 miloj da metroj en tero ni trovas temperaturon 180—200°, kaj tia temperaturo entute sufiĉas por liveri vaporon kaj meĥanikan energion. Baldaŭ Ameriko uzos teran varmon por varmigi domojn.

Naĝanta insulo. Tia insulo ekzistas en Meksiklando, sur granda lago Zira-guen. Sur la insulo kreskas centjaraj arboj. Periode en certa tempo la insulo moviĝas kaj naĝas norden. Tie en kelkdek-kilometra interspaco de sia antaŭa loko, la vojaĝanta insulo staras 5—6 monatojn kaj poste revenas kutiman lokon. Sur la insulo vivas bestoj kaj birdoj. Vojaĝojn de la insulo kaŭzas periodaj ŝanĝoj de fluoj.

Danĝero de senfadena telegrafo. Pariza medicina fakultato atentigas pri danĝeroj, kiujn prezentas radiumo-telegrafo por homoj, laborantaj ĉe ĝi. Telegrafistoj restas dum laboro sub tre malbona influo de altgradaj elektraj fluoj kaj pro tio ĉe ili aperas diversaj nervaj malsanoj, precipe malsanoj de okuloj, aperas nerva tremo de fingroj, ekzemo sur palpebroj kaj manoj. Laborantoj de radiumo-telegrafejoj ŝirmas okulojn per koloraj okulvitroj, kaj manojn — per specialaj gantoj, sed tio ne tute garantias sendanĝeron, kaj ili tre riskas sian sanon. Simile okazas kun laborantoj en radiumo-laborejoj.

Rapideco de flugo de kolomboj. En Parizo oni antaŭ nelonge faris eksperimentojn kun kolomboj. Estis pruvite, ke meza rapideco de flugo de kolombo egalas 65—70 kilometrojn hore.

SUR LA ONDOJ DE L' VIVO.

Afrikana edukado. Origanalaj manieroj de edukado ekzistas en francaj kolonioj Kongo. Tie oni tute ne uzas insultojn, batojn dum edukado de infanoj, sed ĉion malbonan en karaktero de infano oni montras al ĝi per videbla maniero. Ekzemple, se infano malgraŭ malpermeso daŭrigas ludi sur bordo de la rivero, oni kelkfoje subakvigas ĝin por pruvi teruron de droniĝo. Se infano kapricas kaj ploras pro bagatelaj aĵoj aŭ senkaŭze, tiam oni surfrotas ĝian korpon per urtiko, ĝis kiam ĝi ploros efektive kaj kaŭze. Tiam edukmanieron oni konsideras kiel plej bona.

Laborkapablo de maldekstra mano. En gimnazio de S. Olafo en angla urbo Bertmoutsy en nombro de aliaj premioj, aljuĝataj post finiĝo de studjaro, estas unu tre originala — por rutino skribi per maldekstra mano, same bone kiel per dekstra.

La maldekstra mano estas same kapabla, por laboro kiel dekstra. Ni ignoras ĉi-tiun kapablon, kaj, tute ne uzante maldekstran manon por laboro, senkapabligas ĝin.

HIGIENO.

Kiel oni devas dormi. Doktoro Fiŝer opinias, ke neniam oni devas dormi kun kapo apogita alte sur kusenoj. Tia pozicio kaŭzas neregulan sangofluon. Sango defluas de kapo kaj ofte oni vekiĝas matene kun kapdoloro. Tia dormo tute restarigas nek fizikajn, nek mensajn fortojn. Laŭ opinio de la doktoro, neniam oni devas dormi en ĉambro varme hejtita, havante kapon kovritan per litkovrilo; dormi pli ol 9 horoj estas malutile por sano. Normala dormo devas daŭri de 8 ĝis 9 horoj.

Digestado. Homa stomako ne egaldaŭre digestas manĝitajn de ni nutr-aĵojn. Ekzemple: Rostita ĉasaĵo digestiĝas en 1½ horo; pano kaj lakto — 2 hor.; porkaĵo kaj ansero — 2½ h.; rostita bovaĵo — 3—3½ h.; kuirita bovaĵo — 4—4½ h.; fumajita viando — 5—6 hor.; bovidaĵo — 6½ h.

Kronika. — Kroniko.

Varsovio. 16 de Februaro okazis en la P. E. S. ordinara ĵaŭda kunveno de membroj.

Interesan programon plenigis:

S-ro Antoni Grabowski, parolante pri influo de pola lingvo sur konstruon de Esperanto. La prelegento motivigis sian tezon per multaj ekzemploj kaj tiamaniere malkovris antaŭ la aŭskultantoj tute novajn, nekonatajn gramatikajn asociaciojn rilate al pola lingvo.

S-ro Leo Belmont kaj A. Zakrzewski kontinuis la tezon de S-ro Grabowski kaj tre elokvente parolis pri sintakso esperanta kompare kun pola kaj aliaj lingvoj.

S-ro M. Ĉerwiński kaj S-ro Czarnowski amuzigis la societanojn, gaje rakontante humorajojn kaj seriozajojn.

Finigis interesan kunvenon diskutado pri aferoj de la Societo.

Kunveno de U.E.A.-noj:

27-an de Februaro okazis kunveno de U. E. A.-noj. Dis-

trikta delegito D-ro Robin legis raporton pri sia agado en 1910 jaro.

Komerca konsulo de U. E. A. S-ro Lotto raportis pri faritaj servoj koncerne komercajn aferojn.

Estis legita kaj definitive redaktita gvidfolio tra Varsovio, laŭ modelo de ekzistantaj gvidfolioj tra multaj eŭropaj urboj.

Por jaro 1911 estas nove elektitaj: Varsovia delegito D-ro Ludwik Chybzyński, Szopena 1; subdelegito inĝ. Ignacy Tejchfeld, Al. Jerozolimska 82.

— W uzupełnieniu artykułiku *Godne naśladowania*, zaznaczamy, że lista,

według której będziemy rozsyłać 60 (a nie jak błędnie podano — 50) egzemplarzy „Esperantysty Polskiego“, zaabonowanych przez zwolennika naszej idei, — obejmuje: 2 biblioteki, 6 czytelni, 4 lecznice dla przych. chorych, 28 cukierni i mleczarni, 15 restauracji, 5 lecznic dentystycznych.

„Dzień“ pri Esperanto“. La pola ĉiutaga gazeto „Dzień“ (la Tago), posedanta pri Esperanto konstantan rubrikon, kiun redaktas s-ro A. Grabowski, donis en la lasta tempo la sekvantajn artikolojn:

№ 15: Esperanto en la aviado. Esperanto ĉe la fotografistoj. —

№ 15: Esperanto sur la insulo Samos. —

№ 18: Iom da statistikaj datoj. —

№ 21: La konkurantoj de Esperanto. —

№ 22: „Universo“ pri Varsovio. —

№ 27: Polaj kantoj ĉe fremdaj popoloj. —

№ 35: La „Pola Esperantisto“. —

№ 37: „La Tagiĝo“. —

№ 38: „Gustav Vasa“. Dramo de Reinhold Schmidt. —

№ 39: Esperanta ekspozicio. —

№ 42: Polaj elementoj en lingvo internacia. № 45: Paul Spaak: „K a a t j e“, kvarakta teatraĵo. —

№ 46: Alvoko al Junularo pola.

POD PROTEKTORATEM

JEGO MAGNIFICENCYI REKTORA UNIWERSYTETU PROF. DR. AUGUSTA WITKOWSKIEGO, PREZYDENTA MIASTA KRAKOWA J. W. P. PROF. DR. JULIUSZA LEO I KURATORA TOWARZYSTWA J. W. P. PROF. DR. ODONA BUJWIDA, ODBĘDZIE SIĘ DNIA 14 STYCZNIA 1911 ROKU W SALACH STAREGO TEATRU

BAL

„AKADEMICKIEGO ZWIĄZKU ESPERANTYSTÓW“ W KRAKOWIE, NA KTÓRY MAJA ZASZCZYT PROSIĆ

J. W. PAN *a. J. W. Pan* z RODZINĄ

GOSPODYNIE:

ADEROWA LEONOWA, BIEŃKOWSKA PIOTROWA, BILIŃSKA MARYANOWA, BROWICZOWA TADEUSZOWA, DEMBOWSKA MIECZYŚLAWOWA, FIERICHOWA FRANCISZKOWA KSAWEROWA, GRODYŃSKA JÓZEFOWA, HAUSNEROWA WITOLDOWA, HOESICKOWA FERDYNANDOWA, JAWORNICKA JÓZEFOWA, KRZYŻANOWSKA MARYANOWA, LEOWA JULIUSZOWA, ŁAZAŃSKA JÓZEFOWA, MORAWSKA KAZIMIERZOWA, PAREŃSKA STANISŁAWOWA, SCHWARZOWA LEONOWA, SOŁTYSIKOWA TOMASZOWA, STERNBACHOWA LEONOWA, SZARSKA HENRYKOWA, WEIGŁOWA ADOLFOWA, WITKOWSKA AUGUSTOWA, ZBOROWSKA WŁODZIMIERZOWA, ZIELENIEWSKA EDMUNDOWA.

KOMITET:

KRISS JULIUSZ
SEKRETARZ.

BARTOSZYŃSKI WŁADYSŁAW
DZIEWIŃSKI WŁODZIMIERZ
KRONENBERG LEOPOLD
MÜNNIOH HENRYK

ZYGMUNT DYLEWSKI
PREZES.

POPPER MAKSYMILIAN
RUDNICKI STANISŁAW
DR. TISŁOWITZ HENRYK
WALTER KAZIMIERZ.

BILET FAMILIJNY (4 OSOBY) KORON 16:50, BILET POJEDYŃCZY KOR. 5:50, BILET AKADEMICKI KOR. 2:20. — BILETY NA GALERYE PO KOR. 5:50 I 3:30 — WRAZ Z 10% PODATKIEM GMINNYM. O BILETY I ZAPROSZENIA WYDAJE SIĘ CODZIEN NIE W SALI 33 COLL. NOV. OD GODZ. 12-1 W POŁUDNIE I OD 6-7 WIECZOREM PRZY UL. FLORYAŃSKIEJ L. D. 39 II. P. A W DNIU BALU W KASIE STAREGO TEATRU OD GODZINY 10-1 PRZED POŁUDNIEM I OD GODZINY 3 PO POŁUDNIU. O MUZYKA 13 P. P. POD OSOBISTEM KIEROWNICTWEM KAPELMISTRZA W. P. I. HOCKA.

WSTĘP TYLKO ZA ZAPROSZENIAMI.

KWIATY NA MIEJSCU

POCZĄTEK BALU O GODZINIE 9-TEJ WIECZOREM.

gą—jako jedyny materiał sprawozdawczy, podajemy powyżej,

Kalisz. En „Kurjer Kaliski“ ni legas raporton pri loka movado en 1910 j.:

Kurso - gvidantoj de loka Societo „Lumo“: F-inoj Boretti, Peretz, S-roj M. Kaus, Dobrowolski kaj Grüning — plendas, ke instruitoroj ne havis persistecon kaj ne lernis Esperanton ĝis fino, forlasante kursojn en mezo de kurso. La lecionoj, komence pagataj rb. 1.50, poste estis senpagaj.

Societa Komitato havis tre bonan kaj imitindan ideon, proponante siajn servojn al ĉiuj kaliŝaj polaj Societoj. La proponitaj servoj koncernis esperantan korespondadon kun eksterlando, peron en diversaj aferoj, informojn k. t. p.

Ĉu la societoj komprenos utilon de lingvo internacia — vidigos estonto.

La Societo „Lumo“ speciale dankas S-ron Mieczysław Kaus, faktan fondinton de la Societo, kiu konsakris al la Societo multe da tempo, ĉu gvidante la Societon aŭ kursojn, ĉu legante prelegojn por profito de la Societo.

Al la simpatia agema esperantisto kaj kurso-gvidanto lernantoj, de lia lasta kurso esprimis sian grandan dankemon kaj oferis modestan memorajon.

La novelektita komitato de la Societo prezentas sin jene: prezidanto — S-ro Br. Szczepankiewicz, kasistino — F-ino A. Boretti, sekretario — S-ro M. Kaus, bibliotekistino — F-ino Holtz, instruistoj restis la samaj kaj nove S-ino B. Holtz;

anstataŭantoj de komitatanoj estas: F-ino Łukianiec, S-roj Grüning, Nestrupka, S-ino Schattel.

La Societo lokiĝas ĉe la Muzika Societo.

Bochnia. Ideo de lingvo internacia faras en nia urbo ĉiam pli grandan progreson. Jam antaŭ du jaroj ekzistis en ĉi-tiea gimnazio unuaj komencoj de esperanta movado, tamen vera vivo komenciĝis ĵus post la kurso de lingvo internacia, kiun kondukis ĉe societo junulara „Znicz“ S-ro Leon Rosenstock el Kraków. Lia laboro donis por nia ideo krom granda nombro de esperantemuloj, antaŭ ĉio kelkajn verajn esperantistojn. Por ili estis kreigita delegito de U. E. A. en persono de S-ro Leon Drojecki, farmacisto. Nuntempe kalkulas lia regiono dekkvin esperantianojn. Ankaŭ en gimnazio ne ĉesiĝas la laboro; nome funkcias du kursoj, tre bonvole vizitataj, kiujn kondukas S-roj Münch kaj Rosenberg. Por 4-a de Februaro loka societo por memlernado „Życie“ invitis S-ron Rosenstock, por publika prelego pri demando de lingvo internacia. La prelego okazis en salono de „Kasyno“, ĉeestita de multaj personoj. — Mallonge parolante oni povas fini per certigo, ke samlokaj gesamideanoj faros ĉion por disvastigo de nia lingvo en Bochnia kaj ĉirkaŭaĵo.

L. Kronenberg.

Al niaj provincaj kaj eksterlandaj samideanoj. Ni insiste petas Vin sendi al ni ĉiumonate antaŭ 20-an mallongajn notojn pri esperanta movado en viaj regionoj.

Red. de „P. E.“

Kronika powszechna.

Anglja Londyn. Cytamy w „Londona Gazeto“, że kursy Esperanta odbywają się w 37-miu dzielnicach Londynu.

Aldershot. Na propozycję p. C. W. Shanks'a, członka filii „Narodowego Związku Nauczycieli“ — zorganizowano kursy Esperanta dla nauczycieli.

Northampton. Odbywają się wykłady Esperanta w szkole Baptistów.

W całej Anglii, Irlandji i Szkocji — odczyty, kursy, przychylne artykuły w pismach

Francja. Paryż. Gazeta „Paris-Esperanto“ podaje adresy 69-ciu kursów

jęz. Esperanto, funkcjonujących obecnie w stolicy świata.

Grenoble, 550 uczącej się młodzieży płci obojga uczęszcza na kursy jęz. Esperanto; z powodu braku nauczycieli otwarcie jeszcze 4-ch kursów odłożono do przyszłego roku szkolnego.

Hâvre i Boulogne. Wprowadzono wykłady Esperanta do szkół handlowych w tych miastach.

Limoges. Odbywają się specjalne kursy dla robotników.

W marcu r. b. odbywać się będzie we Francji spis ludności.

Każdy esperantysta francuski zaznaczy znajomość Esperanta w rubryce „języki“; da to możliwość określenia liczby esperantystów we Francji.

Niemcy. Berlin. — Znakomity paryski profesor architektury Agaché, wygłosił po esperancku odczyt: „Sztuka społeczna we Francji“.

— Na zjeździe przedstawiciele kolonji niemieckich prof. Meienhof i dyrektor Wschodnio-Afrykańskich kolei żelaznych, wypowiedzieli się za rozpowszechnieniem języka Esperanto wśród plemion afrykańskich w kolonjach niemieckich. Wobec tego, możemy mieć nadzieję, że w niedalekiej przyszłości afrykańskie dzikusy będą naszymi „samideanami“.

Sądzymy, że dzięki Esperantu dzicy wejdą do rodzin kulturalnych narodów.

Założono „Związek niemieckich kolejarzy—esperantystów“. Organem związku jest pismo „Fervoja Esperantisto“. Adres Związku: Otto Glade, Bahnhofsverwalter, Küllenhahn 6. Elberfeld,

Nowe towarzystwa i grupy utworzono w miastach: Münster, Stetin, Ludwigsburg, Memmingen, Mülhausen i Pirna.

W 43-ch gazetach niemieckich — przychylnie artykuły i wzmianki o Esperancie i jego szybkim rozwoju.

Belgia. Namur p. René Dubois wygłosił odczyt na temat „Esperanto w praktyce“. Odczyt wzbudził wielkie zainteresowanie.

Bruksella. Znany francuski architekt p. Agaché, wygłosił po esperancku odczyt „Tanie mieszkania“.

Antwerpja. Na kursy języka dla policji uczęszcza 116 policjantów i 14 oficerów policji.

— Na kongres esperancki zapisało się już 338 esperantystów.

Artyści teatru Królewskiego pilnie uczą się ról 4 aktowej sztuki „Kaatje“ flamadzkiego pisarza Paula Spaak'a. Sztuka ta, której ocenę znajdują czytelnicy w nin. numerze, będzie odegrana po esperancku podczas VII kongresu.

Austrja. Triest. Doskonały odczyt D-ra Ghez'a poprzedził otwarcie kursów języka; zapisało się na wykłady 180 osób.

— Firma Adelbert-Colmadine wydała esperanckie katalogi i prospekty.

— Klub kroackich pisarzy wydał ilustrowany rocznik w którym kilka artykułów poświęcono Esperantu.

Hiszpanja. Barcelona. Przy towarzystwie „Racionalna Kultura“ zorganizowano grupę esperancką „Racionala Grupo“.

— Królowa Hiszpańska, wbrew etykiecie dworskiej, przyjęła dar od pisma „La Movado“ w postaci pięknego wachlarza, na którym artystycznie namalowano alegorię esperancką.

(Taki sam wachlarz ofiarowano królowej Rumuńskiej).

Madryt. Na zjeździe przedstawiciele Organizacji Ekonomicznych jednogłośnie przyjęto wniosek o potrzebie przyjęcia Esperanta i postanowiono sprawę tę oddać do szczegółowego rozpatrzenia komisji.

Włochy. Włoska gazeta, codzienna, polityczna „Il Lavoro“ — dzięki zabiegom p. Ettore Fasce z Genewy — otworzyła regularny kącik esperancki, który rozpoczyna się gorącym wezwaniem do zajęcia się Esperantem. Artykuł poprzedzony wstępem po włosku jest drukowany w jęz. esperanckim.

Bułgarja. — Organizuje się Bułgarska Esperancka Liga Nauczycieli.

Gazeta „Seme“ — komunikuje, że nauczyciele francuskiego języka w Bułgarji, w obawie utraty posad z chwilą wprowadzenia Esperanta — występują wrogo przeciw międzynarodowemu językowi.

Ameryka. Pitsburg. Miejscowe t-wo esperanckie wydało bankiet. Między innymi wygłosili mowę: rektor Uniwersytetu, dyrektor żeńskiego gimnazjum, dwóch redaktorów najwięcej wpływowych dzienników i konsul angielski. Rektor Uniwersytetu obiecał niezwłocznie wprowadzić wykłady Esperanta, a prof. Armstrongy, szef East Liberty Akademii, postanowił tytułem próby wprowadzić Esperanto do Akademii — jako przedmiot obowiązkowy, a potem przeprowadzić odnośną ankietę.

— Redakcja „Amerika Esperantisto“ w ciągu ostatnich 2-ch miesięcy otrzymała z górą *dziesięć tysięcy* listów z prośbą o przysyłanie podręczników.

Brazylja. Kursy Esperanta stale funkcjonują we wszystkich normalnych szkołach w Rio-de Janeiro.

— Nowe towarzystwa utworzono w Bahia i Racife.

Para. Kursy języka stale odbywają się przy Towarzystwach „Uniao Hispanhola“ i „Instituto Civico Paes de Carvalho“. Wykłada prof. D-r Nuno Baena.

Meksyk. Towarzystwo esperanckie propagacyjne złożyło władzom rządowym raport o stanie i ruchu esperanckim w całym świecie.

Merida. Otworzono nowe towarzystwo.

Nowa Zelandja. Założono Związek Esperancki, który ma filje w głównych miastach.

— W Invercargill — dwa kursy języka w szkole technicznej.

— Rządowy urząd podróży i higieny wydał ilustrowany przewodnik, gdzie znajdujemy uwagę, że wszyscy funkcjonariusze kolejowi obowiązkowo uczą się Esperanta.

Persja.—W perskim dzienniku Begar ukazał się bardzo przychylny artykuł o Esperancie.

Fakty.

W Antwerpii, mieście 7-go kongresu esperanckiego—na propozycję szefa tamecznej policji p. Schmidta—zapisało się na kursy jęz. Esperanto 14-u oficerów policji i 116 policjantów.

Rada miejska ofiarowała komitetowi kongresowemu zasilek w kwocie 3000 franków.

Konkurs. Polityczna gazeta angielska „Eastbourne Gazette“, ogłosiła konkurs z nagrodami na najlepszy przekład z angielskiego na Esperanto.

Redakcja pisma „The British Esperantist“ otrzymała od Departamentu Ministerjum Oświaty list takiej treści: „Jesteśmy upoważnieni zakomunikować W. Panom, że Esperanto został zaliczony do przedmiotów, na których naukę wydajemy zapomogi szkołom wieczornym i kursom“.

Esperanto i deputowani francuscy. W odpowiedzi na rozesłane cyrkularze już dotąd 54-ch deputowanych francuskich wypowiedziało się przychylnie o wprowadzeniu Esperanta do wszystkich szkół Francji.

Oczekiwane są dalsze przychylnie odpowiedzi.

Katolicy niemieccy i Esperanto. Ruch esperancki wśród katolików niemieckich rośnie z dnia na dzień. W wielu mia-

stach założono filje Wszechświatowego Związku Katolików—Esperantystów. Na uwagę zasługuje fakt, że nuncjusz papieski w Bawarii w specjalnym cyrkularzu polecił Esperanto biskupom niemieckim i zakomunikował o tem Jego Świętobliwości Papieżowi, Piusowi X. Biskup Georgius Schmid von Grüneck, wygłosił wspaniałą mowę o znaczeniu Esperanta dla Powszechnego Kościoła Chrystusowego p. t.: „Wspólny język—jako droga do miłości ludów i pokoju“.

Wobec ostatnich powodzeń Esperanta, postanowiono wydawać specjalne pismo dla katolików niemieckich—esperantystów p. t.: „Monatsblätter für Katholische Esperantisten“.

Esperanto w korespondencji technicznej. Laboratoire central d'électricité w Paryżu oraz Standard Bureau, w Waszyngtonie, przeprowadzają studia nad jednostkami elektrycznymi i korespondują w tej kwestji wyłącznie po esperancku.

Kursy Esperanta dla marynarzy. Grupa w Portsmouth (Angl.), zachęcona powodzeniem propagacyjnego wieczoru esperanckiego na okręcie królewskim „Vernon“, — utworzyła codzienne kursy Esperanta dla załogi pomienionego okrętu.

En Esperantaj Societoj.

„UNIVERSO“, internacia klubo de kolektanto de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Tiu ĉi klubo, jam havanta membrojn en Germanujo, Holando, Britujo, Rusujo, Svisujo kaj Danujo, celas flegi la belan sporton de interŝanĝado de ilustritaj poŝtkartoj kaj poŝtmarko. Ĝi gajnas ĉiutage novajn anojn, ĉar ĉiu membro ricevas por la tre malalta jara kotizo de M. 2 F. 2¹/₂, 2 ŝil., 1 ₡ — ne sole senpage la monatan liston de novaj membroj, sed ankaŭ senpage la belan presitan klubjurnalon „La Kolektanta Esperantisto“, kiu de post Januaro aperas presite. Interesiĝantoj bonvolu sin turni al la prezidanto s-ro O. Strössner, München, 28, Brieffach — kiu senpage sendas provnumeron kaj la klubregularon.

Internacia Studenta Esperantista Frateco.
Sekretario: A. S. Arnold, L. L. B. 24, St. Marks Place, Nov-Jorko, U. S. A.

La celo de la societo estas:

- 1) Interligi diversnaciajn gestudentojn.
- 2) Disvastigi la uzadon de Esperanto inter gestudentoj.
- 3) Korespondadi inter la ĉiulandaj gestudentoj.

Jara kotizo 0.50 ₡.

Mikrografa Societo La estonteco apartenas al la naturscienco! Sed precipe la „mondo en plej malgranda spaco“, kiu nin ĉirkaŭas plej proksime, tre interesas la nuntempulojn, ĉar nia materia substanco, nia propra korpo, konsistas el bilionoj da malgrandaj eroj, nome „ĉeloj“ kaj kiu jam nur deziras scii ion pri sia propra korpo, devas uzi por tio mikroskopon. Sed ne nur la scion pri nia korpo ebligas mikroskopo, ankaŭ la cetera ĉirkaŭmondo malfermiĝas nur al armita okulo kaj malkovras ĉiam novajn miraklojn al povosciulo. „El akvo, tero kaj aero eligas miloj sin da ĝermoj“ — diras Goethe, kaj certe estas por ĉiu interese scii pri tiuj ĝermoj. Ankaŭ tion ebligas nur mikroskopo!

Kiu volas esti enkondukita sen multaj elspezoj en tiun mondon de malgrandaĵoj, en tiun mikrokosmon, li aliĝu, ĉu riĉulo aŭ mal-

riĉulo, fabrikanto aŭ laboristo, junulo aŭ maljunulo, al la *Mikrografa Societo*, kiu posedas laborejon enhavantan ĉiujn helpilojn de l' scienco por esplorado de la „mondo en plej malgranda spaco“, kaj kies fervoraj anoj estas kuracistoj, advokatoj, ĥemiistoj, fabrikantoj, oficistoj, oficiroj, metiistoj, studantoj, laboruloj, sciencistoj kaj lernemuloj.

Por kotizo ĉiumonata — nur unu korono la anoj de la „Mikrografa Societo“ ricevas sen pluaj elspezoj almenaŭ fakan gazeton ilustritan kaj povas senpage lerni, labori ka esplori sur la mikroskopia teritorio,

Skribajn aliĝojn akceptas s-ro P. Frenzel, gast teknikisto en Wien, VI, Theobaldstr. 11-a kaj s-ro O. Oppeln, fotografo en Wien, VIII, Alserstr. 55.

Internacia Esperanto-Teknika Asocio. Akceptante l' inviton de s-ro inĝ-ro Ettinger el Rusujo, kiu unue alvokis la teknikistan samideanaron fondi internacian Asocion, mi prenis sur min la taskon provizore organizi la I. E. T. A. aŭ T. E. T. A. Tial mi petas inĝenierojn, ĥemiistojn kaj ĉiujn teknikistojn, kiuj intencas aliĝi, skribi al mi. Same mi petas la samideanojn, ke ili bonvolu diskonigi tiun alvokon. Jam mi ricevis aliĝilon de naŭ landoj. Por la unua jaro ni prenos kiel oficialan gazeton la „Internacia Scienca Revuo“, kiu ĉiam pli dediĉos paĝojn al nia Asocio, kiom pli da membroj havos nia Asocio. La regularo de la T. E. K. A. povas tute bone taŭgi por nia celo. La kotizaĵo povas esti 4 ₡ kun l' abono al la Scienca Revuo. Nune ni povas komenci l' elekton de Naciaj sekretarioj, kaj mi petas kiu tion deziras bonvolu skribi al mi. Fine mi invitas la teknikistojn, kiuj certe multenombre vizitos Italujon en tiu ĉi jaro okaze de la du gravaj internaciaj ekspozicioj en Roma kaj Torino, bonvolu ĉeesti specialan kunvenon en Genova dum la tagoj de la dua itala Kongreso de la esperantistoj (25—28 Majo 1911) Adreso: D-ro Alfredo Stromboli Industria Ĥemiisto, Via Assaroti 54-15, Genova (Italujo).

APARTENI AL IA ESPERANTA SOCIETO — ESTAS DEVO DE ĈIU VERA ESPERANTISTO.

Konsideru!

Kio estas frateco? La vorto „frato“ esprimas la sentojn de amo, afableco, bonkoreco, simpatio; kaj kiam ni aŭdas ĝin, en nian menson tuj alvenas bildo de kunulo, kiu estas ĉiam preta helpi nin. Nia frato bonvole zorgas pri ni; li ne deziras profiti per nia malprofito, kontraŭe li amas nin pli ol sin mem, kaj, ĉar li estas vera frato, ni povas ĉiam konfidi je lia helpo. Nia feliĉo estas lia ĝojo, kaj li malĝojas pro nia malfeliĉo. Nia frato helpas nin laŭ sia plej bona povo; se ni erarus, li fidele, kuraĝe kaj amike montrus al ni nian kulpon kaj helpus al ni fari tion, kio estas bona kaj prava. Frateco signifas interkompreniĝon, interhelpadon kaj sekve interfeliĉecon. Ĝi estas ĝoja stato kaj la plej prospera, plej progresa kaj plej bona stato por ĉiuj. *La Simbolo.*

Bona konsilo. Neniam demandu infanon: „Kiun vi pli amas, vian patron aŭ patrinon?“ Per tia demando, pri kiu la infano ankoraŭ neniam pensis, vi kaŭzas malkonsenton en la juna animo de l' infano. Eĉ se la infano unuamomente respondas: „Mi amas egale patron kaj patrinon“ — ofte restos dubo en ĝia propra eldiro. Tamen, se la infana animo jam okupis sin pri tiaj pensoj, sed ne riskis respondi al

si mem, efektivigas la respondon per via demando. Tiam estas farita la unua paŝo al apartigo inter infano kaj patrino aŭ inter infano kaj patro. *Germ. Esperantisto.*

Kiel fariĝi riĉulo? Amerika milionulo Cargnegie opinias: „Plej bona impulso por fariĝi milionulo estas malriĉeco. Estas grave, se ni ne havas flankan helpon. Oni devas labori memstare je sia propra respondeco kaj risko. Necesa kondiĉo: akceladi elektitan celon reziste kaj ĉiumaniere. Malsukceso ne davas nin konfuzi. Intensigu menson, hardigu energion. Antaŭen kontraŭ ĉio! El ĉiuj ricevitaj dolaroj — ŝparu unu, sed reprenu ĝin nek por unu minuto.“

William Astor diras: „Absolute evitu vinon kaj tabakon. Neniu homo povas profiti monon, se lia menso estas malklara. Do vi ne nebuligu cerbon per alkoholo kaj nikotino. Neniam estu ŝuldata. Nenio pli surprenas ol ŝuldoj. Estu okupita nur per unu afero kaj alkonduku ĝin al sukceso. Se vi konvinkiĝos, ke la afero estas senutila, vi forlasu ĝin kaj priokupu sin per alia. Du leporojn vi ne pelu. Elspezu malpli ol vi ricevas.“

La devo de vera esperantisto.

En „La Holanda Pioniro“ (III. 2-a novembro 1910) ni trovis jenajn vere legindajn por ĉiu vera esperantisto vortojn:

„Kiu estas esperantisto? Ĉu li estas persono, kiu same kiel tiu, kiu lernis la francan aŭ anglan lingvon, havas la rajton, enŝlosita inter la kvar muroj de sia ĉambreto, nevidata, neĝenata kaj senzorge, ĝui de la belega literaturo verkita en tiu lingvo? Tute ne: esperantisto havas specialan *devon* kaj Esperanto havas specialan *celon*.

Kion celas Esperanto? Laŭ praktika vidpunkto ĝi celas plifaciligi la materialajn rilatojn inter la popoloj kaj etike ĝi celas, pere de tiu komuna komprenilo, enporti en la mondon pli da interfratiĝado, pli da paco kaj amo.

Kio estas la devo de vera esperantisto?

Ĝi estas: efike helpi, helpi laŭ povo kaj forto, por kiel eble plej baldaŭ atingi la suprenomitan celon.

Ĉu ni plenumas tiun devon, se ni diligente studas lingvon, se ni kapablas aku-

rate kaj flue ĝin paroli, se ni ĉiun semajnon sendas ilustritan poŝtkarton plibeligitan kaj plivalorigitan per nia nomo al iu ajn nigrulo, brunulo aŭ blondulo?

Tute ne; ni tiamaniere ne malhelpas laŭ povo por la baldaŭa atingo de la dezirata celo; ĉar ne sufiĉas, ke ni povas flue paroli, ke ni povas interrilati kun aliaj, ke ni havas ilon por enporti pli da komprenado kaj do pli da paco en la mondon: ni ne povas esti kontentaj, ĝis kiam ankaŭ aliaj povas disponi pri tiu sama nobla ilo. Ni do devas instigi aliajn fariĝi esperantistoj, en kio ni sukcesos nur, se ni estos bonaj propagandistoj. Kaj ni ĉiuj *povas* esti tiaj; ĝi dependas nur de nia sincereco kaj bonvoleco. La agadokampo estas vastega, sed ĝis nun la laboruloj estas tro malmultaj, el kio rezultas la bedaŭrinda fakto, ke la kampo restas preskaŭ neplugita.

Se ĉiu, kiu lernis la lingvon, kiu komprenas la altan celon, volus esti esperantisto („isto“ estas iu, kiu *faras* ion), se ĉiu

laŭ povo, volus helpi la kelkajn agemajn laborantojn, tiam baldaŭ nia movado kreskus, ke ni plune bezonus honti pri nia pigmea formo.

Esti propagandisto estas tiel facile; ĝi eĉ ne nepre forprenas iom de nia libera tempo, ĉar propagandon ni jam faras, se ni *regule* kaj *videble* portas nian verdan stelon; ne estas necese, ke ni estu lertaj esperantistoj por ĝin; la stelo ne estas nur pruvaĵo de nia kapableco, ĝi estas unuflanke rekonilo por niaj samideanoj kaj aliflanke ĝi servu, por vekti la scivolecon de neesperantistoj tiel, ke ili informas sin de ni pri la signifo de la „kvinpintaĵo“.

Propagandistoj ni jam estas, se ni, troviĝante kun nia amiko aŭ amikino en multe vi-

zitataj lokoj (strato, kafejo, ktp.). ĉiam parolas (ne balbutas) nian lingvon.

Propagandistoj ni jam estas, se ni, uzante tramojn aŭ vagonojn, ĉiam kunportas iun ajn esperantan gazeton kaj ĝin legas tiel, ke la kunvojaĝantoj povas samtempe legi la titolon de la gazeto. Atentu nur la scivolemajn rigardojn de viaj najbaroj kaj plu ne dubu, ĉu vi faris propagandon.

Ni ne ĉiuj bezonas esti lertaj aŭ spertaj esperantistoj! ni ne ĉiuj bezonas publike paroladi, por esti propagandistoj. Ni nur bezonas iom da kuraĝo, forpelante nian falsan honton. Ni nur bezonas esti konsciaj, ke esperantisto estas senvalora kreitaĵo por la esperanta movado, se li ne scias plenumi sian *devon*“.

Bibliografio.

Dictionnaire usuel Esperanto-français.

E. Grosjean-Maupin. Hachette et Cie, Paris 1911.

En tiu-ĉi sia mezgranda vortaro Esperanto-franca la aŭtoro parte riparas tion, kion li malbonigis en sia plena vortaro per enkonduko de propraj, arbitraj ŝanĝoj kaj novaĵoj, kiuj elvokis la pravan proteston de l' esperantistaro. La plej granda parto de la arbitraĵoj estas forigita el tiu ĉi nova vortaro, sed bedaŭrinde la aŭtoro ankoraŭ ne tute liberiĝis el sia danĝera tendenco. Kelkajn vortojn, kvankam ili troviĝas en fundamenta vortaro, li forigis, „ĉar ili estas senpore kompreneblaj“, anstataŭ tio s-ro G. M. enkondukis, je propra respondeco, novajn vortojn kiel: torporo, fifro, kuspi, grefti, stampfi k. t. p., kiujn ne konas la ĉiulandaj esperantistoj.

Cours Méthodique d' Esperanto. Corrigé des Thèmes.

Camille Aymonier et E. Grosjean-Maupin. Hachette et C-ie. Paris 1910.

Ni volonte represus la aldonitan al la verketo recenzon, ĉar la libro estas zorge prilaborita de du tre kleraj esperantistoj, sed bedaŭrinde ankaŭ en ĝi ni trovas la „danĝeran tendencon“ kvankam en malpli alta grado.

Frazojn kiel: „Ili vidadis violence impetu vorticojn“, kaj vortojn kiel: „subita retroiro, majesteco violaciita, pasioj violencaj“ k. t. p. — ni vane penus deĉifri laŭ la esperantaj vortaroj, ne esceptinte la plej plenan el ĉiuj de prof. Emile Boirac. Nia komuna vortaro konstante pligrandiĝas, sed tio okazas trankvile kaj sendanĝere en la literaturo. Se ĉiu volus fari arbitrajn eksperimentojn en naciaj lernolibroj, tiam nia universa interkompreniĝo per Esperanto baldaŭ ĉesus kaj ni havus baldaŭ novan turon babelan. Ĉu la kleraj aŭtoroj tion ne komprenas?

Sub la meznokta suno.

Lehman Wendel. Originalaĵoj kaj tradukaĵoj el la sveda lingvo. Ilustrita de la tradukinto. Chicago. Amerika Esperantista Kompanio. 1910. P. 122. Prezo: broŝure ₯ 0.70; bindite ₯ 1.20.

Belan kolekton da nordlandaj popolrakontoj pri pigmeoj kaj gigantoj, pri sorĉistinoj kaj feinoj — prezentas al ni la aŭtoro en sia elegante eldonita kaj lerte ilustrita libreto. Por la plenaĝa leganto la nordlandaj tradiciaj fabeloj havas etnografian kaj kulthistorian ĉarmon. La plej juna esperantistaro aŭskultos ilin kun granda ĝuo, kiel ni mem plezure spertis. La lingvo estas pure esperanta, korekta kaj libera de ĉiuj arbitraĵoj.

Noto pri la Inicilo matematika

Verko de *Jak Kameskas*, Paris, Librejo Hachette kaj K-o, Boulevard Saint Germain 79.

De longe ekzistas pedagogiaj ludoj por infanoj; ili permesas al instruistoj ekzerci infanajn mensojn per facila kaj komprenebla maniero. „Inicilo matematika“ estas unu el tre bonaj ludoj, kaj celas klarigi al infanoj matematikajn ideojn. Ni deziras ĉi-tie diri pri ĉi-ludo nur kelkajn vortojn.

Aŭtoro de „Inicilo“ eliras de principo, ke ĉiu homo, des pli lernanta infano, pli bone komprenos la matematikan kalkuladon kaj ideon, se li povos vidi kaj imagi tion, kion li devas lerni. Tiam li memoros pli facile la viditan bildon, ol se li devus nur imagi la ideon en sia menso. Tute vere! la videblaj eksperimentoj plej facile restas en nia menso. Ne sufiĉas, se infano kiel papago, lernas nur parkere matematikajn principojn; estas absolute necese, ke infano povu bone kompreni kaj imagi tian ideon, kiun ĝi lernas. Por tia celo la „Inicilo matematika“ konsistas el 1200 malgrandaj kubo de dimensioj de 1 centimetro; ĉiu kubo reprezentas „matematikan unuon“. Por ricevi pli klarajn figurojn, 600 kubo

estas blankaj, 600 — ruĝaj. Krom tio ekzistas 144 vergetoj, kiuj servas por fiksigo de kubo, por ke la kunmetitaj figuroj ne disfalu.

La „Inicilo“ povas servi aŭ kiel ludo — la infano tiam kunmetas diversajn figurojn: domojn, tablojn k. t. p. — aŭ kiel scienca rimedo. Uzante la „Inicilon“, la instruistoj klarigas al infanoj matematikajn principojn: ideojn pri la unuo, pri la kompono de dekoj, de centoj, de miloj; pri la dekuma nombrado; pri operacioj aritmetikaj: adicio, subtraho, multipliko, divido, frakcioj, radikoj, algebrakaj geometriaj teoremoj; pri la metro sistema k. t. p.

Infanoj vidante, kiel formiĝas ĉi tiuj ideoj, kaj ankaŭ kiel ili ricevas konkretajn formojn, alproprigas per la plej facila maniero la matematikajn sciojn kaj eblon de facila kombino.

Sen dubo, tia maniero de instruado estas la sole racia kaj pro tio la „Inicilo matematika“ meritas, ke edukantoj uzu ĉi-tiun ludon en lernejoj aŭ ekstere — en domoj.

Ig. Td.

Protesto.

Franca kaj secesie-esperanta vortaro de S-ro Grosjean-Maupin faris en esperanta mondo grandan bruon kaj ne mirinde, ke ĝi elvokis plej energiajn protestojn de ĉiuj fidelaj al fundamento esperantistoj. La protestoj, kiujn ni trovas preskaŭ en ĉiuj esperantaj gazetoj, resumiĝas jene:

Ni plej energie protestas kontraŭ la nova Esperanto-Franca vortaro de S-ro Grosjean-Maupin, kiu enhavas amason da novaj vortoj.

Pro tio, ke tiaj tute arbitre kreitaj novaj vortoj estas tute nenecesaj kaj prezentas nur grandan balaston.

Pro tio, ke tia maniero, krei nov-

ajn vortojn kaj anstataŭi ĝisnunajn esprimojn per tute novaj arbitre kreitaj nepre malakordiĝas kun la fundamentaj evoluoprincipoj de nia lingvo *Esperanto*.

Pro tio, ke la *Lingva Komitato* havas la taskon zorgi pri netuŝo al la fundamento kaj pri la evoluado de la lingvo sur la bazo de nia fundamento, ni petas la Lingvan Komitaton, oficiale kaj plej energie kondamni la supre cititan kaj similajn verkojn, kies sola efiko povas esti, ke ili detruos la fruktojn de ĝisnuna propaganda laborado kaj senkreditigos nian tutan Esperantan aferon.

Revuo de la Gazetoj.

NOTO. En ĉi tiu fakto ni regule citos ricevatajn interesajn gazetojn en kronologia vicordo—laŭ tempo de ilia ricevo.

(10|I) **Espero Katolika** (Novembro) Internacia monata gazeto, honorita per Apostola Beno de Pius X; monate; esperante; red. Abato C. Duvaux kaj prof G. Gautherot; redakcio — Vincennes (près Paris), Place de la Mairie, 7, rue Eugène-Renaud; abonprezo 2 ₯.

La revuo grupigas ĉirkaŭ si multajn katolikajn pastrojn kaj estas — pro sia enhavo — grava propagandilo de katolikismo per Esperanto.

(13|I) **La Holanda Pioniro** (Januaro). Ni legas en statistiko, ke en holanda gazetaro lastatempe aperis artikoloj pri Esperanto en 39 gazetoj

(13|I) **Ĉasopis Ĉeskych Esperantistů** (Decembro). La numero enhavas baladon de A. Mickiewicz „Vojevodo“, trad. de L. L. Zamenhof.

(13|I) **La Spritulo** (Januaro) Humoraja gazeto; monate; esperante; red. Richard Bresch, Dresden-Blasewitz, Tolkewitzerstr. 20 (Germanujo); abonprezo 1.20 ₯.

Filozofa Kant opiniis pri la utilo de la rido por sano. Se li vivus nun, li sendube konsilus pro samaj motivoj aboni „La Spritulon“. „La Spritulo“ estas par excellence internacia humoraja gazeto. Al ĝi — siajn spritaĵojn alsendas ĥinoj, japanoj, turkoj, persoj, rusoj, poloj, francoj k. t. p.

(13|I) **Greklingva Esperantisto** (Oktoebro) Monata revuo, oficiala organo de la „Samosa Esperantista Societo“; esperante kaj nov-greklingve; red. Samosa Esp. Societo en Samos (Azia, Turklando) — abonprezo 1.20 ₯.

(17|I) **Germana Esperantisto** (Januaro). Bonega artikolo: „Kiu volas pacon?“ Enhavo tre diversa kaj riĉa.

(17|I) **La Instruanto** (Januaro) Ĉiumonate. Organon por lernantoj de Esperanto; germane kaj esperante; red. Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstrasse 18—19; abonprezo 1 ₯.

La tekstoj estas plejparte paralelaj: germane-esperantaj aŭ facilaj nur esperante; la gazeto estas vere utila por komencantoj.

(17|I) **Nova Sento** (Januaro) Esperanta Gazeto de Bilbao (Hispanujo); abonprezo 0.90 ₯.

(17|I) **Germana Esperanto - Gazeto** (Decembro) kun aldonoj: „Germana Esperanto-Instruisto“ kaj „La Informanto“ (vidu sube). Ni trovas artikolojn: Esperanto-problemo definitive solvita. — Admono de „Legendoj“ de A. Niemojewski. — Pri la sepa kongreso k. t. p.

(Januaro) De ĉi-tiu numero la gazeto aperados semajne; abonprezo 3.50 ₯ jare.

Bonan sukceson al nia semajna gazeto!

(17|I) **La Informanto** (Januaro) Oficiala organo de Internacia Esperanta Informa Oficejo; red. H. J. Hoen, Magdeburg, Schrotestrasse 68.

La celo de ĉi-tiu nova gazeteto estas: „servi al la akiro de ĉiuspecaj, sed precipe komercaj kaj konfidencaj informoj en ĉiu parto de la tero. De nia sidejo en la urbeto Luxemburg, lokita en centro de Europo kaj plej oportuna por tia organizaĵo pro poŝtaj rilatoj, ni elradios niajn nepercepteblajn kaj delikatajn fadenojn super la tuta civilizita mondo, starigonte iom post iom agentejojn en ĉiu lando de terglobo“.

La gazeto intencas doni al ĉiu abonanto koncizajn informojn pri esperanta movado, komerco, vivo k. t. p. Ĝi liveros materialon por propagandistoj, por kronikoj de la gazetoj kaj alian.

„La Informanto“ aperados ĉiusemajne kune kun „Germana Esperanto-Gazeto“.

(18|I) **Rund um die Welt** (Januaro) Propagandaj artikoloj — germane; noveleto „La Bloko“ kvarlingve: angle (orig.), esperante, germane kaj france. Bonega ideo!

(18|I) **Juna Esperantisto** (Januaro). Kiel kutime — tre interesa enhavo.

(18|I) **Espero Katolika** (Decembro). Ni legas: Pri la germana katolikagado — 10-a kongreso de hungaraj katolikoj — Tra Ameriko — Katolika preĝejo por rusoj en Romo — La konvertiĝoj al katolikismo en Anglujo — Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista k. t. p.

(20|I) **Svisa Esperanto** (Januaro) ofic. organo de la Svisa Esp. Societo; monate; esperante, france k. germ.; red. Th. Renard, 6, rue du Vieux-Collège, Genevo; abonprezo 1.20 ₯.

(20|I) **La Du Steloj** (Nov.-Dec.) oficiala organo de Ĉila Esperantista Asocio; monate; esp. kaj hispane; red. Casilla—728—Santiago (Chile); abonprezo 1 ₯.

(20|I) **Paris-Esperanto** (Januaro) Grandformata kvarpaĝa, monata informa gazeto en franca lingvo, aperanta kiel oficiala organo de Pariza Federacio Esperantista; adr. de red.: 21, rue de l' Arabe-Sec, Paris.

(21|I) **La Esperantisto** (Decembro) Monata internacia gazeto por Politiko, Scienco, Literaturo, Arto, Sporto, Komerco kaj Humoro; esp. kaj germ.; red. Fritz Stephan, Leipzig, Kochstr. 61; abonprezo 1.50 Mk.

Enhavo interesa sed bedaŭrinde, la lingvo tre ofte lamas; ni trovas multe da eraroj, nekorektaĵoj. Estus dezirinde, ke la redakcio pli zorgu pri la pureco de la lingvo kaj evitu maldecaĵojn en „Humoro“.

(21|I) **Verda Stelo** (Decembro). Plezure estas legi ĉi-tiun ĵurnalon kaj scii pri esperanta vivo de niaj antipodaj samideanoj.

(21|I) **Cuba Esperantisto** (Decembro) organo oficiala de Cuba Societo por propagando de Esperanto; hispane; red. A. A. Ruiz, Habana La Oficina Central (Cuba).

(23|I) **Voĉo de Kuracistoj** (Februaro) Artikoloj pri preparato „606“, Daŭrigo de „Internacia enketo pri mortpuno“, Kroniko.

(23|I) **Belga Esperantisto** (Januaro) Daŭrigo de nomaro de la kongresanoj de la Sepa (aligantaj antaŭ 4a Januaro) kaj aliaj interesaj sciigoj pri kongreso.

(24|I) **Hungara Studento** (Januaro). Tre prave admonas esperantistojn la redakcio: „Se vi ne konas nian lingvon — ne portu esperantan stelon, sed se vi konas — via esperanta devo estas porti ĝin ĉiam.“

(25|I) **Eĥo Esperantista** (Januaro) Monata aldono al germana gazeto „Echo“; esperante kaj germ.; redaktoro Karl Steiner, *Berlin SW.* Dessauerstr. 1.

(26|I) **Universo** (Kajero V) Internacia revuo por Belo; monate; esperante; red. d-ro A. Schram, *Dresden 20*; abonprezo 3 ₰.

Tre interesaj artikoloj kun ilustraĵoj: El la Dresena Zoologia Ĝardeno — El Esperantujo — Polaj samideanoj k. al.

(26|I) **Amerika Esperantisto** (Januaro). La revuo ŝanĝis aspekton. efekta kovrilo, bela, dika papero.

La enhavo estas same interesa kaj leginda.

Ni ekscias, ke ĝisnuna redaktoro s-ro Artur Baker ekŝiĝas kaj la revuon redaktos de nun s-ro Ivy Kellerman-Reed.

La adreso de nova redakcio estas: 816, 15 th. St., *Washington, D. C.*; abonprezo 2.50 ₰.

(26|I) **Lingvo Internacia** (Januaro). Ni trovas interesan artikolon: „La lasta malsano de Goethe“, Fragmentojn „La sonĝo de l' dezerto“ de Niemirowiĉ-Danĉenko“, „Mia pentraĵo“ el „La Tria“ de H. Sienkiewicz, traduko de A. Grabowski.

En artikolo „Okaze de perdita Antaŭparolo“, S-ro Th. Cart skribas:

„Kion mi diris en ĝi, mi ne plene memoras. Tion ĉi tamen tre bone: okaze de tiu *unua* iom plena naci-esperanta vortaro, mi insistis kiel eble plej forte pri la danĝero, pri la neebleco traduki esperanten ĉiujn esprimojn, ĉiujn dirmanierojn, ĉiujn nuancojn de *ĉiuj* niaj lingvoj. Esperanto, mi skribis, estas tiel riĉa, kiel multaj tre uzataj kaj al siaj uzantoj tute sufiĉaj lingvoj, sed ĝi ne povas, ĝi ne celas kunigi la diversan riĉecon de *ĉiuj* homaj lingvoj. Tia ambicio farus ĝin fine pli malfacila ol nacia lingvo. Ni ne postulu de ĝi tion, kion ĝi ne povas doni kaj kion cetere ni, praktike, absolute ne bezonas. Ni memoru la fablon pri la rano kaj la bovo! Ni ne krevigu nian lingvon!“

Hodiaŭ, iom melanĥolie, kaj pli poezie mi aldonus: Simpla, gracia sinjorino estas nia lingvo; ĝin ni amas en ĝia simpleco kaj gracieco. Ho, sinjoroj pliriĉigistoj, kovrante ĝin per ĉiaspecaj ornamaĵoj, perloj, diamantoj, juveloj pli malpli falsaj, ĝin vi ne faras pli bela nek pli alloga, vi nur detruos ĝian antaŭan ĉarmon ĝis ĝi perdos kun sia simpleco kaj facileco la kialon mem de ĝia vivado.“

(27|I) **Dana Esperantisto** (Decembro) Oficiala organo de la Centra Dana Esperantista Ligo; monate; esp. k. dane; red.: Bregade 35, *Kopenhago K.* — Librejo Most & Sön; abonprezo 1.50 ₰.

(31|I) **Semo** (Januaro) monate; bulgare kaj esperante; red. D. Malĉev, hotelo „Poŝto“ — *Tirnovo* (Bulgarujo).

Tre bonajn esperojn kaj projektojn havas la redakcio de „Semo“, promesante eliradi ĉiusemajne nur se ĝi havos 10.000 abonantojn! Mallongan atendon ni deziras!

Tre bonan propagandan alvokon adresas la redakcio al: lernantoj (junularo), scienculoj, instruistoj, kuracistoj, advokatoj kaj juĝistoj, deputatoj, laboristoj, komercistoj, ĵurnalistoj — al ĉiuj konvene motivante la utilon de apliko de lingvo internacia.

(31|I) **Internacia Socia Revuo** kaj

(31|I) **Laborista Esperantisto** (Januaro)

Artikoloj pri laborista movado en ĉiuj landoj.

(2|II) **Danubo** (Januaro). En ĉefartikolo pri unueco ni legas: „Do ni estu viglaj, fidelaj kaj kuraĝaj! — Se ni estas pravaj, kial do timi? Kial ŝanceliĝi? Tenu vin kuraĝaj. La venko estos sur la flanko de la vero, de la honesteco... Ni laboru senripoze! Amikoj, venis tempo por agado. Vigle, vigle ni nin tenu!“

Bela papero, belaj presliteroj, riĉa literatura kaj alia enhavo faras ĉi-tiu 32-pag. revuon vere modela por niaj esperantaj gazetoj.

(3|II) **German-Austria Esperantisto** (Januaro) Oficiala organo de germanlingvaj grupoj en Aŭstrio; esp. kaj germ.; red. K. F. Ahlgrimm, *Wien, VII, Kaiserstrasse № 10*; abonprezo 1.25 ₰.

(4|II) **La Simbolo** (Januaro) Internacia gazeto; monate; esperante; red. Symbol Publishing C-o, Post Office Box 1020. *Tacoma Washington*; abonprezo 2.50 ₰.

Ĉarma, 32 paĝa literatura, luksa revuo, kun bonlingvaj kaj belenhavaj literaturajoj.

(6|II) **L' Esperantiste Catholique** (Januaro) Organo Esperantista de Katolikaj Asocioj, monate; esp. kaj france; red.: Claudius Colas; Office Espérantiste Catholique, 20, rue d'Angoulême, *Paris*; abonprezo 2.50 fr.

Ni ekscias, ke 2a Internacia Kongreso de Katolikoj-Esperantistoj okazos de 14 ĝis 18 Aŭgusto en Hago.

(6|II) **Franca Esperantisto** (Februaro). Pri la Estonteco de Esperanto — traduko de artikolo el franca gazeto „Excelsior“, Vintraj Sportoj, Historio de Esperanto en Francujo k. t. p.

(6|II) **Germana Esperantisto** (Februaro). Prof. V. Esperema, aŭtoro de „Adjuvilo“ aŭ „Ido plibonigita“ publike deklaras, ke li tute forlasas sian projekton, kiu celis nur montri „Idajn“ erarojn, sed neniam havis intencon konkuri kun „Esperanto“, kiun prof. V. Esperema fervore aprobas. Deklaron finigas la frazo: „Vivu kaj venku nia Zamenhofa Esperanto!“

(7|II) **The British Esperantist** (Februaro). La Boksisto — noveleto de Waclaw Sieroszewski trad. Br. Kuhl. La Laŭreato — noveleto de Każ. Przerwa-Tetmajer trad. de L. Rosenstock. Interesplena resumo de esperanta movado en 1910 sur ĉiuj kampoj.

(6|II) **Internacia Scienca Revuo** (Januaro). Artikolo pri teknikaj vortoj.

(7|II) **Gazeto Hispana** (Januaro). La revuo aperadis ĝis nun sub la titolo: „Gazeto Andaluza“, kiu laŭtitole havis nur malvastan sferon de agado. De nun la „Gazeto Hispana“ estas oficiala organo de Hispana Societo. La redakcio kaj kondiĉoj la samaj kiel antaŭe.

(7|II) **Juneco** (Januaro). Tamen la duon-Ida vortaro de s-ro Grosjean-Maupin trovis amikan akcepton en la redakcio de „Juneco“ kiel „bonega verko“. Ni dubas, ĉu la redaktoro de *esperanta* revuo legis ĉi-tiun „bonegan verkon“. Sed, se li efektive legis ĝin kaj la vortaro lin ravigis — tio pruvas, ĉio en la mondo estas ebla! Non mirari, non indignari sed itelligere!

(7|II) **Paris-Esperanto** (Februaro). La gazeto estas konsakrita por propagando de Esperanto inter Francoj enhavas artikoloj kaj komunikoj precipe en franca lingvo.

(7|II) **La Verda Standardo** (Januaro). La revuo ŝanĝis sian aspekton: la ĝis nun aperantan belan kajeroforman revuon anstataŭis grandforma gazeto.

(7|II) **Esperanto-Folket** (Esperanta popolo) (Januaro). Organo por propagando de Esperantismo en Svedujo; monate; esp. kaj svede; red.: G. H. Backman en *Hölsingborg*; abonprezo 1.50 ₰.

(9|II) **Germana Esperanto-Gazeto** (15, 22, 29 Januaro kaj 5 Februaro № № 2, 3, 4 kaj 5) kun „*La Informanto*“ kaj „*Germ. Esp. Instruisto*“. Oni povas difini valoron de ĉi-tiu gazeto — unuvorte bonega! La literaturo, artikoloj, diversajoj, humoro — bonegaj! Kaj ĉion la feliĉaj legantoj ĝuas — ĉiusemajne!

Por citi ĉion citindan — ni devus kopie skribi tutan enhavon de la gazeto. En la № 3a kaj 4a de „*La Informanto*“ oni trovas tabelojn de enhavo el kelkaj esperantaj gazetoj.

(10|II) **La Movado** (Februaro). La revuo estas redaktata en vere publicista maniero kaj enhavas la plejn novajn, interesajn sciigojn, faktojn, okazajojn.

(10|II) **Esperanto** (Februaro). Multego da plej diversaj kaj tre interesaj artikoloj k. e.: Moderna ĥina lernejo, La protektado de birdoj, La Klubo en Granda Britujo. Pri la reformo de l' kalendaro. La loĝantaro en Usono. Nafta regno. La prezo de l' mono en la ĉefaj eŭropaj landoj. Tra la literaturo (recenzo pri „Unuaj agordoj“, poezioj de Wiktor Elski kaj Eska) ktp.

(10|II) **Le Monde Esperantiste** (Jauaro). Par excellence, ĵurnale kaj rutine redaknta revuo: interesa, ĉionscianta, vigla. Grava ĉefartikolo ektuŝas demandon pri „Klerigado de la Laboristoj“, Modele redaktataj kronikoj k. ct.

(10|II) **Antaŭen Esperantistoj!** (Septembro kaj Oktobro) Monata gazeto, organo de la Perua Esperantista Societo; esperante kaj hispane; red. D-ro Fed. Villareal, *Lima*, Aportados, 998, Peruo; abonprezo 1.20 ₰.

(10|2) **La Dek-Sepa** (Februaro). La revueto havas lokan (parizan) intereson.

(10|II) **Oficiala Gazeto Esperantista** (Januaro) enhavas tre gravan en gramatike-lingva senco artikolon pri la signifo kaj la uzo de la prepozicioj en Esperanto; la artikolo estas unu el la serio de gramatikaj studoj, organizitaj de Lingva Komitato.

(13|II) **Oficiala Buleteno** (Januaro) por la delegitoj kaj konsuloj de U. E. A.; Centra Oficejo de U. E. A. 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo).

(13|2) **Bulletin Officiel** (Februaro).

(13|1) **Internacia Stenografia Gazeto Gabelsberger**. (Februaro). Redaktoro: D-ro Schramm *Dresden* 20. Organo de la Internacia Ligo „Gabelsberger“ kun Stenografia Aldono (laŭra sistemo Gabelsberger - Schramm). Redaktojo: K. Wallon, Frankfurt a. M.

La stenografio Gabelsbergera estas adaptata preskaŭ al ĉiuj lingvoj eŭropaj kaj havas ĉie multe da adeptoj. Ĉe ni en Polujo oni uzas ĝin laŭ adapto de Poliński en la galicia parlamento kaj instruas ĝin en ĉiuj komercaj lernejoj. Ni estas certa, ke la novan organon, unuigantan unue la diversnaciajn adeptojn, la esperantaj stenografiistoj ĝoje salutos kaj energie subtenos. La enhavo de la nova organo estas tre interesa, la stenografia aldono belege skribita.

(13|II) **Nova Sento** (Februaro). Riĉa enhavo kaj bona literatura parto distingas ĉi-tiun simpatian revueton.

(14|II) **Germana Esperanto-Gazeto** (Februaro). Pri-ĉi tiu numero ni konservas la same bonan opinion kiel pri antaŭaj numeroj.

(14|II) **La Ondo de Esperanto** (Januaro). La numero estas pli diversigita kaj estas facile rimarki penon de la redakcio en ĉi-tiu direkto. Favora artikolo pri Varsovia esperanta ekspozicio.

Le Phare Stenographique (Jauaro) Monata revuo stenografia; esperante kaj france; red.: 60, rue des Carmes, *Rouen* (Francujo); abonprezo 4 fr.

(16|II) **La Marto** (Januaro). Preskaŭ tutan numeron plenigas originala humora unuakta teatraĵo „Grava tago“ verkita de J. Vec.

Ni petas ĉiujn esperantajn Redakciojn sendi al ni interŝanĝe po 2 ekz. de iliaj gazetoj. — „*Polan Esperantiston*“ ni sendos al ĉiuj esperantaj gazetoj senescepte.

Konkursoj kaj problemoj.

Atentu!

Ĉar je du konkursoj enmetitaj en № 1-2 de „P. E.“ ni ne ricevis sufiĉan kaj esperitan nombron de respondoj — ni prokrastas ĉi-tiujn konkursojn ĝis Aprila numero.

Ni faras etan ŝanĝon de rekompenco en konkurso por „je“, nome:
1-a rekomp. — libroj je valoro 5 rb.
2-a „ — pentraĵo de Matejko „Grunwald“ aŭ libroj je valoro 3 rb.

Ni rememorigas al niaj legantoj „Konkursan juĝon“ en 1-2 numero kaj petas ilin alsendadi opiniojn pri elektinda moto por nia revuo.

La konkurso de »Excelsior«.

En franca ĵurnalo „Excelsior“ kiu gaste me kaj fervore malfermis siajn paĝojn por Esperanto ni legas:

„Excelsior“ decidis, ke sub ĝiaj aŭspicioj oni faros eksperimenton samtempe tre simplan kaj tute konkludigan. La celo de tiu eksperimento estos konstat per nediskutebla kaj preskaŭ matematika rimedo, ĉu en ĝenerala vidpunkto Esperanto havas efektive la tre grandan valoron kaj la perfektan precizecon, kiujn ĝiaj adeptoj unuanime interkonsentas difini al ĝi.

Tia provo nenian dubon postlasos, kaj en sia noveco samtempe utila kaj amuza, ĝi certe forlogos niajn legantojn. Jen ĝia temo kaj mekanismo:

La demando unue estis elekti francan tekston. Nia eminenta kunlaboranto Abel Hermant, akceptis bonvole doni al „Excelsior“ neeldonitan tekston kaj skribi paĝon da proksimume cent linioj por la speciala celo de tiu provo.

La fiksitajn tagojn, t. e. la venontan 10-an de Februaro, tiu teksto, ĝis tiam sekreta, estos komunikigita al ses tradukistoj invititaj kaj kuniĝintaj en la oficejo de „Excelsior“, zorge grupigitaj de S-ro Hasselot, internacia leĝisto kaj ĵura tradukisto ĉe la Apelacia Kortumo, kaj ĉiuj licenciatoj de vivantaj lingvoj; ilia bone konata kompetenteco estos al ni nediskutebla garantio. La tekston al ili oni diktos kaj sinsekve ĉiu tradukos tiun francan tekston en sian specialan lingvon (angla, rusa, germana, itala, hispana kaj esperanto). En tiu

aro da tradukistoj egale sin trovos kun la sama rajto kaj por la sama laboro, eminenta esperantisto, S-ro Carlo Bourlet, prezidanto de la esperantista grupo en Parizo, kiu kun granda komplezo akceptis la mision, kiun ni proponis al li.

Post tiu laboro, la teksto tiamaniere tradukita estos donita al dua tradukistaro, kiu, kompreneble, nenion scios pri la unua teksto. Tiu tradukistaro estos preta en la oficejo de l'ĵurnalo kaj ĝi devos retraduki francan el angla, rusa, germana, itala, hispana kaj esperanta lingvoj tiun tekston dum difinita limtempo.

Ĉiuj francaj tekstoj tiamaniere ricevitaj estos kunmetitaj kun la teksto originala, komparitaj kaj ordigitaj laŭ la merito. La merito de tiu retraduko en franca lingvo estos konsiderita laŭ la vidpunkto de la fideleco kaj riĉeco de interpretado, kaj juĝita de juĝantaro elektita inter la eminentaj kunlaborantoj de „Excelsior“.

Sume, la demando estas, rilate al Esperanto, ke ĝi pruvu, ke nur ĝi ne meritas la riproĉon enhavitan en la fama proverbo: *traduttore, traditore* (tradukanto, perfidanto), sed prezentas, per la rapideco mem de sia procedo la malpli deformitan penson.

La rezultoj estos publike proklamitaj dum tagmeza kunveno organizita ĉe la teatro „Femina“. Post parolado de S-ro Tristan Bernard, al la genivitaj de „Excelsior“, oni faros tute ĉirkaŭkonstancan surprizon: la prezenj taden, en Esperanto, de unu el la plej beletaktoj de la repertorio.

KOREKTO!

En 11-12 numero de „Pola Esp.“ en muziknotoj „El opero Halka“, la teksto de la 18-a kaj 19-a taktoj estas presita erare. Oni devas korekti tiel:

c a h | c h c d c | h
Ki - on for- do - ni mi po - - vis.

Władysław Niżnik

oficisto ĉe poŝta Direkcio en Lwów (Galicio-Aŭstrio) deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesperantistoj per ilustr. poŝtkartoj.

Nepre ĉiam respondas kaj sendas sian portreton.

Angulo humoraja.

Ĉefo kaj sekretario.

(Humorajo de Klewe).

La ĉefo alvokas en kontoron, sian sekretaron:

— Kion vi pensas, sinjoro sekretario, pri nia nova praktikanto? Mi opinias, ke oni ne povas lin prezenti al ranga antaŭenigo.

— Mi opinias, ke ne...

— Ĉar ŝajnas al mi — diris plue la ĉefo, sen atendi respondon — ke li estas sentaŭgulo mallaboremulo, dando...

— Verdirante — diris la sekretasio — li estas sentangulo, mallaboremulo, dando...

— Li ne alvenas regule en kancelarion — daŭrigis la ĉefo.

— Jes — asertis la sekretario — li ne alvenas regule en kancelarion...

— Iafoje li tute ne alvenas...

— Iafoje eĉ tute li ne alvenas...

— Li ne plenumas konvene siajn referatojn...

— Li ne plenumas referatojn...

— Kaj krom tio li estas tromefimdulo.

— Kaj kia tromemfidulo!

— Unuvorte, li absolute ne decas por ni

— Absolute, li ne decas, tre ĝuste, absolute.

— Nu, tute absolute, oni ja ne povas...

— Ĉar aliflanke, tiu knabo havas talenton...

— Talenton li havas, efektive.

— Kaj li posedas certan spriton, rapidemon kaj lertecon en laboro.

— Ho, spriton, rapidemon kaj lertecon, li posedas, oni devas al li tion aljuĝi.

— Kaj li finas dum unu kvarono tion, por kio iu alia bezonas tutan horon.

— Jes, tio estas vere, al li sufiĉas horokvarono...

— Krom tio, li prezentas sin tre bone.

— Li prezentas sin tre bone, sendube...

— Kaj li estas ankaŭ tre konscienca.

— Jes, konscienca li estas certe...

— Li devenas el tre bona familio.

— La familio estas ankaŭ tre bona.



— Li havas edukon, klerecon...

— Lia eduko kaj klereco estas tute dezirandaj...

— Unuvorte, bonega materialo por ofi-cisto.

— Tre bona, bonega materialo!

— Do, ni lin prezentos al rangantaŭ-enigo?

— Nu, ni lin prezentos...

— Ĉar, kiel ŝajnas, tion li tute meritas.

— Jes, tute, tutege, sinjoro ĉefo!

El la pola originalo tradukis
(El „Nova Sento“.) *Helena Hempel.*

* * *

Gajaj pensoj.

— Tra serurtruon oni povas vidi pli multe ol tra malfermita pordo.

— Se la homoj ion ne volas vidi, ili diras: „Mi ne vidas“.

— Fianĉo kun fianĉino pasigas kune pli multe da tempo ol geedzoj.

— Francino havas matene 30 jarojn, tagmeze — 25 kaj vespere — 20.

* * *

Ŝi: Ho jes, mi scias... Vi jam ne amas min plu!..

Li: Kial??

Ŝi: Vi ĉiam foriras, kiam mi ludas fortepianon.

Nu jes, kara mia: amo povas esti blinda sed neniam... surda.

* * *

— Diru, sinjorino, ĉu la hundo, klu kuŝas tie sur la seĝo, ne mordos min?

— Ho, ne! pro tri kaŭzoj: unue, vi ĝin ne instigas, due: ĝi, kuŝante al vi dorse, ne vidas vin, kaj trie, ke ĝi estas malviva, plenŝtopita.

NADESLANE.

Wystawa Esperancka w Warszawie.

Zważywszy, że dzięki wynikłemu deficytowi po zamknięciu naszej wystawy, zmuszony jeszcze jestem starać się o pokrycie tegoż deficytu drogą dalszych składek wśród członków Towarzystwa (co nie pozwoli zapewne prędzej niż w pierwszych dniach marca zakończyć rachunków wystawowych), zważywszy tę okoliczność, wypada mi *tymczasowo* ograniczyć się jedynie do ogłoszenia nazwisk osób, które raczyły w *dalszym ciągu* ofiarować różne kwoty na urządzenie Wystawy lub pokrycie deficytu. A więc:

Dr. Ludwik Chybczyński 50 rb.; Dr. Józef Krenicki 3 rb. i 1 rb. na pokrycie deficytu; Dr. M. Kapłan 3 rb.; p. Jan Stojowski 1 rb. i 3 rb. na pokrycie deficytu; p. Jerzy Polczyński 15 kopiejek; p. T. Matuszewski 1 rb.; p. Zygmunt Greffkowicz 2 rb.; p. Leo Belmont 2 rb. i 8 rb. na pokr. defic.; p. W. Juszkiewicz 2 rb. i 1 rb. na pokr. defic.; p. Wilhelm Tymanowicz 1 rb.; Dr. A. Groszlik 1 rb.; pani L. S. 2 rb.; p. Mieczysław Czerwiński 1 rb.; p. Józef Wójcikiewicz z Łucka 1 rb.; p. L. Ferencowicz 2 rb. 50 kop. i 1 rb. na pokr. defic.; p. J. Rejner 1 rb.; uczniowie kursu p. Czarnowskiego 1 rb. 70 kop.; p. Wacław Wojde 1 rb.; p. A. Ossowski 50 kop.; p. A. Zambrzycki

50 kop.; p. A. Stankiewicz 50 kop.; panna M. Zakrzewska 50 kop.; p. August Kręcki 50 kop.; p. J. Mikulski 50 kop.; p. R. Ostrowski 50 kop.; p. Adam Kenig 50 kop.; pani Szachowa 2 rb.; p. Teleżyński 50 kop.; p. A. Koziara 2 rb.; p. Br. Jabłkowski z Irkucka 3 rb.; p. K. Rybczyński 1 rb. 36 kop. i 50 kop. na pokr. defic.; p. Ignacy Goszczyński z Żarnowca 1 rb. 10 kop. i p. Józef Grygosiński z Częstochowy 1 rb. — Nadto raczyli jeszcze złożyć różne kwoty na *pokrycie deficytu* pp.: Dr. Ludwik Zamenhof 10 rb.; Dr. Leon Zamenhof 10 rb.; p. N. N. 10 rb.; p. Henryk Niemojewski 6 rb.; p. Jerzy Loth 5 rb.; p. Ignacy Tejchfeld 5 rb.; Dr. Józef Skłodowski 3 rb.; Dr. Adam Wizel 3 rb.; Dr. W. Robin 2 rb. p. Stanisław Czarnowski 1 rb. 50 kop. Dr. Iz. Krenicki 1 rb. i p. Włodzimierz Malinowski 50 kop.

W następnym numerze „Esperantysty Polskiego“ ogłoszę ogólne cyfry wydatków i wpływów na urządzenie Wystawy Esperanckiej w Warszawie oraz przedstawię równocześnie Komitetowi Towarzystwa jak najszczegółowsze rachunki z przychodu i rozchodu na rzecz tejże Wystawy.

Aleks. Bolesł. Brzostowski.

Warszawa, 18 Lutego 1911.

Respondoj de la redakcio.

A. S-ro Ettore Fasce en Genova. Danko por la gazeto „Il Lavoro“. Citita en „P. E.“

Al S-ro Czesław Kozłowski en Kiev. Danko por via afabla leteró. La tradukoj — atendas lokon.

Al S-ro J. Chankowski. La kontakto, kiun vi opinias neekzistanta — ekzistis kaj ekzistas. Pri la Ekspozicio ni ja skribis artikolojn en №№ 6|7, 8, 9|10, 11|12, 1|2, 3; templimo de la ekspozicio ne estis fiksita antaŭ apero de Decembra numero de „P. E.“ kaj nia Januara numero aperis post fermo de la ekspozicio.

zicio. Do, kial ni ne skribis pri templimo de ekspozicio en nia *monate* aperanta gazeto — estas komprenebla. Ekzistas neniam „gravaj kaŭzoj“. Bonega ŝarado — en venonta numero.

Ni dankas por la leteroj.

Al S-ino Krasovska en Garvolin, S-oj K. Nawrocki en Bendzin, A. St. Reiner en Sambor, D-ro J. Geliebter en Zamość, B. Szczepankiewicz en Kalisz — korajn dankojn por iliaj leteroj kaj komunikoj.

Al S-ro L. Kr. „Klimĉjo, Vi estas feliĉa“ — ne konvenas. Ni petas ion alian.

Pri la eldonado de „P. E.“

En 1911 jaro „POLA ESPERANTISTO“ elirados regulare ĉiumonate en iom pligrandigita amplekso. La programo estas plivastigita kaj plidiversigita. JARA ABONPAGO afrankite rb. 2.50 = ₰ 2.65; sen aldono „LITERATURA JARLIBRO“ — rb. 2.00 = ₰ 2.10.

Adreso: WARSZAWA, la Redakcio — Str. Krucza 47a, la Administracio — Hoża 20

Redaktor -Wydawca
Eldonanto-Direktoro

Jan Günther.

Tel. 204-60.

Sekretarz
Sekretario

M. Czerwiński.